Erfreulicherweise haben die EU-Mitgliedsländer Polen und Kroatien das Esperanto bereits als Teil ihres Kulturerbes anerkannt. In Ungarn können seit Jahrzehnten staatliche Abschlussprüfungen in Esperanto abgelegt werden. Die Österreichische Nationalbibliothek stellt



Literatur zu und in Plansprachen und insbesondere Esperanto bereit. Außerdem ist das Esperanto-PEN-Zentrum seit 1993 Mitglied der internationalen Schriftsteller-Vereinigung PEN International; der Vatikan hat Texte für Messen in Esperanto 1990 genehmigt; China unterstützt Esperanto in vielfältiger Weise - so veröffentlicht <http://esperanto.china.org.cn/> seit 2001 praktisch täglich Nachrichten in Esperanto.

Es wäre schön, wenn die EU-Kommission und ihre Mitarbeiter:innen das zur Kenntnis nehmen würden.

## Esperanto-Sprachgemeinschaft und Esperanto-Bewegung

Viele Falschinformationen zu Esperanto verbreiten die irrige Vorstellung, Esperanto werde nur kaum oder gar nicht gesprochen und es gebe keine Kultur in Esperanto; es handle sich lediglich um einen Vorschlag einer Sprache, aber keine richtige Sprache - und damit sei es auch unsinnig, ein solches Projekt, das nie zum Leben gekommen sei, etwa im Rahmen der EU breiter anzuwenden. Das ist eine nachvollziehbare Schlussfolgerung, die allerdings in der Luft hängt, weil der Ausgangspunkt vollkommen falsch ist. Der am Anfang und Ende unzutreffende Gedankengang ist in vielen Aussagen von Sprachwissenschaftler:innen und EU-Mitarbeiter:innen erkennbar.

Es sei daran erinnert, dass die Deutsche Gesellschaft für Sprachwissenschaft in ihrer Satzung erläutert, sprachwissenschaftliche Tätigkeit sei die wissenschaftliche Erforschung natürlicher Sprachen (Punkt 3.1 (2) "Ordentliches Mitglied kann in der Regel jede volljährige, natürliche Person werden, die sprachwissenschaftlich, d.h. bei der wissenschaftlichen Erforschung natürlicher Sprachen tätig ist." [https://dgfs.de/de/assets/content/Dokumente/Satzung%20DGFS%20Version%205%20\(2001\)%20aktuell.pdf](https://dgfs.de/de/assets/content/Dokumente/Satzung%20DGFS%20Version%205%20(2001)%20aktuell.pdf)); das erklärt, warum Sprachwissenschaftler:innen oft nur sehr wenig Kenntnis von dem als künstlich angesehenen Esperanto haben und in vielen Fällen auch völlig falsche Vorstellungen; vgl. den Beitrag "Zum Bild des Esperanto aus der Sicht einiger Sprachwissenschaftler", <http://www.interlinguistik-gil.de/wb/media/beihefte/JG12018/JG12018-Wunsch.pdf>.



Aussagen von Sprachwissenschaftler:innen zu Esperanto können sinnvollerweise nur dann berücksichtigt werden, wenn die Autor:in ein paar Artikel zu Esperanto veröffentlicht hat oder das Wissen anderweitig nachgewiesen hat; ein paar Zeilen sind jedenfalls nicht ausreichend zum Nachweis einer Kompetenz. Abschreckendes Beispiel hierzu sind etwa die vollkommen irreführenden Aussagen des Übersetzungswissenschaftlers Eugene A. Nida zu Esperanto, dessen Artikel "Translator's Confrontations with False Ideas about Language" trotz vielfachem Protest von Esperanto-Sprecher:innen ein paar Jahre lang auf den Seiten der EU-Kommission zu lesen war. Esperanto hat sehr wohl eine Kultur, die Sprache wird täglich gesprochen und die Kultur wird von Generation zu Generation weitergegeben; [https://web.archive.org/web/20070125023419/http://ec.europa.eu/translation/reading/articles/pdf/2000\\_tp\\_nida.pdf](https://web.archive.org/web/20070125023419/http://ec.europa.eu/translation/reading/articles/pdf/2000_tp_nida.pdf).

Bei den etwa zehn Zeilen scheint es sich um das Gesamtwerk von Eugene A. Nida zum Thema Esperanto zu handeln.

Wenn man irrtümlich denkt, Esperanto würde nicht oder nur sehr wenig gesprochen und es habe keine Kultur, dann kann es auch keine Esperanto-Sprachgemeinschaft geben, die irgendwelche Rechte einfordert. So ist es vielleicht nicht überraschend, dass in den Berichten zwar die Anregung der Esperanto-Bewegung zu finden ist, Esperanto im Rahmen der EU zu verwenden, nicht aber die Anliegen der Esperanto-Sprachgemeinschaft. Vorschläge wie die Anerkennung des Esperanto als Kultursprache von EU-Bürger:innen oder die Forderung nach objektiver Information zu Esperanto, <https://futureu.europa.eu/processes/ValuesRights/f/12/proposals/41119>, betreffen insbesondere die Esperanto-Sprecher:innen als Esperanto-Sprachgemeinschaft. Das ist deutlich unterschieden von Vorschlägen, Esperanto im Rahmen der EU zu nutzen, die eher allgemeinpolitisch sind. Die genannten Anliegen der Esperanto-Sprachgemeinschaft gehören ebenso in die Berichte wie die Anregungen der Esperanto-Bewegung.

### Esperanto-Vorschläge nicht erreichbar

Besonders bedauerlich ist, dass zumindest drei Vorschläge zu Esperanto über längere Zeit nicht erreichbar waren - es gäbe ein Problem mit dem Server, wurde angezeigt. Das betraf im Juli die Idee 5399, <https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/5399>, und im Oktober/November die Ideen 44420 und 145037, <https://futureu.europa.eu/processes/Democracy/f/6/proposals/44420> und <https://futureu.europa.eu/processes/ValuesRights/f/12/proposals/145037>.

So haben diese Vorschläge viele Stimmen nicht erhalten, weil sie nicht aufgerufen werden konnten; uns haben reihenweise Beschwerden erreicht. Es war schon außerordentlich erstaunlich, dass von den 20 am meisten unterstützten Ideen in einem Themenbereich insgesamt 19 ohne weiteres zu sehen waren und bei dem Esperanto-Vorschlag von einem Server-Problem berichtet wurde...

### Tradition unzutreffender Informationen zu Esperanto

Insgesamt ist mit Bedauern festzustellen, dass es im Zusammenhang mit der Vorschlags-Plattform der EU-Zukunftskonferenz mehrere Vorfälle gab, die die Vorschläge zu Esperanto benachteiligt haben. Es fällt schwer, in dem Zusammenhang nicht daran zu denken, dass die EU-Kommission sich in der Vergangenheit und bis heute mehrfach und mit falschen und irreführenden Informationen gegen Esperanto gewendet hat.

Neben dem obigen Zitat eines Vertreters der Kommission gegenüber der Presse zu Esperanto und Kultur und dem von E. Nida auf den Kommissions-Seiten mögen die folgenden Texte als Beispiel dienen: Die Rahmenstrategie für Mehrsprachigkeit, 2005, in der unzutreffend und diffamierend zu lesen ist: "Das Verstehen anderer Kulturen wurzelt im Erlernen der entsprechenden Sprachen, die Ausdruck dieser Kulturen sind. Daher fördert die Kommission die Verwendung künstlicher Sprachen nicht, die per definitionem keine kulturellen Bezüge haben." Eine solche Definition gibt es nicht, die kulturellen Bezüge des Esperanto sind offensichtlich, das Esperanto ist Ausdruck der Kulturen seiner Sprecher und der in über hundert Jahren entstandenen Esperanto-Kultur; es ist in gleicher Weise zu fördern wie andere kleinere Sprachen. <https://eur-lex.europa.eu/legal-content/DE/TXT/HTML/?uri=CELEX:52005DC0596&from=DE>.

Weiterhin ist Esperanto auf der folgenden Seite irreführend dargestellt: "Häufig gestellte Fragen zu Sprachen", 2013, [https://ec.europa.eu/commission/presscorner/detail/de/MEMO\\_13\\_825](https://ec.europa.eu/commission/presscorner/detail/de/MEMO_13_825). Dort ist u.a. von Esperanto in der angeblichen Funktion als einziger, europaweiter Sprache für die EU zu lesen. Klar ist demgegenüber einerseits, dass Esperanto nur ergänzende Sprache sein kann und soll. Andererseits nutzt die EU-Kommission auf Tausenden von Seiten Englisch als einzige Sprache und schließt damit die Mehrheit der EU-Bürger:innen von diesen Informationen aus. Auch aus den anderen Aussagen zu Esperanto wird mehr als deutlich, dass viele Mitarbeiter:innen der Kommission in Sachen Esperanto noch im Land der Ahnungslosigkeit wandeln. Das belegen auch die Antworten, die die EU-Kommission im Laufe der Jahre auf parlamentarische Anfragen zu Esperanto gegeben hat.

Um gegen diese Falschinformationen und die Irreführung der Öffentlichkeit sowie gegen die damit verbundene Diffamierung des Esperanto und seiner Sprach- und Kulturgemeinschaft anzugehen, bleibt uns vor allem der Weg, uns an Institutionen wie die Europäische Bürgerbeauftragte sowie an EU-Parlamentarier:innen zu wenden. Die EU-Kommission reagiert auf Schreiben leider in der Regel nur mit der Übersendung unwichtiger Randinformationen und allgemeiner Texte (teils aus Internet-Seiten kopiert), aber ohne eine sinnvolle Beantwortung der gestellten Fragen und ohne eine Änderung der Informationspolitik zu Esperanto.

Lu Wunsch-Rolshoven

## Medienecho

**Herzlichen Dank für zugesandte Artikel und Hinweise. Bitte geben Sie bei Mitteilungen einen eindeutig identifizierbaren Absender und einen sinnvollen Betreff an, damit sie nicht im Spam Ordner landen.**

**Netzbeiträge, die nur über Angabe persönlicher Daten, per Passwort, kostenpflichtig oder nach Anmeldung zu lesen sind, sind kursiv gedruckt.**

**Auf nicht im Netz erschienene Berichte, die aber vorliegen, wird hingewiesen. Diese können Interessenten gerne als Kopie zum persönlichen Gebrauch (nur per Netzpost) zugesandt werden. Anfragen an "medienecho@esperanto.de" - Bitte den jeweils genannten Betreff angeben.**

Danke, Hermann

**20. Juni 2022**  
VHS Hameln-Pyrmont  
Esperanto-Luft schnuppern mit dem Rattenfänger  
Einführung in die internationale Plansprache

Zusammen mit dem Rattenfänger von Hameln lernen wir die Grundzüge der Sprache kennen! Das Kinderbuch "La shalmisto de Hamelin" zeigt in unterhaltsamer Weise, wie die Sprache klingt.  
[https://www.vhs-hamel-pyrmont.de/\\_kufer/webbasys/index.php?kathaupt=20&katid=4&knr=D426000HM&kursname=Esperanto-Luft+schnuppern+mit+dem+Rattenfaenger](https://www.vhs-hamel-pyrmont.de/_kufer/webbasys/index.php?kathaupt=20&katid=4&knr=D426000HM&kursname=Esperanto-Luft+schnuppern+mit+dem+Rattenfaenger)



**30. April 2022**  
Esperanto für Anfänger  
Einstündiger Schnupperkurs. Für alle, die noch keine Esperanto-Kenntnisse haben.  
Der Esperantokurs auf hohem Niveau - einmalig in Wien.  
<https://eventaservo.org/e/7f9a98>

**11. Januar 2022**  
Pädagogische Blätter: Organ des Vereins kathol. Lehrer und Schulmänner der Schweiz  
Warum wir für Esperanto eintreten, und wie wir uns seine Einführung denken – Aus dem Jahr 1913

„Der gewaltig gewachsene internationale Verkehr vollzog sich bis jetzt im allgemeinen durch eine Vielheit von Sprachen,



„Weltsprachen“, als welche in erster Linie zu nennen sind das Englische (Übersee-Handel), Französische (Diplomatie, amtlicher Verkehr) und Deutsche (in Mittel- und Osteuropa); in zweiter Linie durch Spanisch Spanien, Mittel- und Südamerika), italienisch, Russisch (im russischen Weltreich), und Portugiesisch (Portugal mit Kolonien, vor allem Brasilien).“  
<https://www.e-periodica.ch/cntmng?pid=scs-002%3A1913%3A20%3A%3A1645>

**10. Januar 2022**  
Radio Dreyeckland  
Esperantomagazin  
<https://player.fm/series/series-1419774/esperanto-magazin-montag-10012022>



**4. Januar 2022**  
Deutschlandfunk Kultur  
Über die Entbabelung der Welt  
Plansprachen Volapük, Esperanto und Solresol  
Alle Menschen sprechen eine Sprache und es herrscht Frieden. Mit dieser Wunschvorstellung wurden immer wieder Sprachen wie

Esperanto erfunden. Den Weltfrieden haben sie bisher nicht gebracht, ihre Faszination dennoch nicht verloren.  
<https://www.deutschlandfunkkultur.de/plansprachen-volapuek-esperanto-und-solresol-die-100.html>



**2. Januar 2022**  
Radio Dreyeckland  
Esperantomagazin: Fotoj  
1 ¼ stündige Esperanto-Sendung  
<https://rdr.de/model60073>



**1. Januar 2022**  
Esperanta retradio  
Esperanta Retradio estas de s-ro Anton Oberndorfer el Supra Aŭstrio.  
Tie vi trovas ĉiujn tagojn multflankajn raportojn.  
<http://esperantaretradio.blogspot.com/?view=flipcard>

**29. Dezember 2021**  
Eine offizielle Netzseite der Europäischen Union  
Digitaler Wandel  
Der digitale Wandel schreitet voran, und das betrifft auch die Verbreitungswege für Hör- und Fernseh-Rundfunk. So müssen





beispielsweise Autoradios von Neuwagen, die in der EU verkauft werden, für DAB+ ausgelegt sein; ebenso gilt das für andere Radios, die den Programmnamen anzeigen. Auch Barrierefreiheit sollte in möglichst vielen Lebensbereichen verwirklicht werden — in diesem Fall: sprachliche Barrierefreiheit.

Niemand sollte Nachteile haben, weil er die vorherrschende Ethnosprache seines Umfelds nicht versteht — sehr wohl aber die einfach und schnell erlernbare Welthilfssprache Esperanto. Es ist also naheliegend, diesen Vorschlag umzusetzen.

<https://futureu.europa.eu/processes/Digital/f15/proposals/150021?commentId=181964>

27. Dezember 2021

**gutefrage**  
**Welche Universalsprache würdet ihr präferieren, wenn die Vereinigten Staaten von Europa in der Realität käme?**

Es kann auch für Esperanto gestimmt werden.

<https://www.gutefrage.net/frage/welche-universalsprache-wuerdet-ihr-praeferieren-wenn-die-vereinigten-staaten-von-europa-in-der-realitaet-kaeme>



7. Dezember 2021  
**Helmstedter Nachrichten**

Schade, leider nur mit Bezahlschranke  
„Alle sprechen die selbe Sprache“: Michaela Stegmaier (27) möchte ihre Esperanto-Begeisterung in Braunschweig und der Region mit anderen teilen.

<https://www.helmstedter-nachrichten.de/braunschweig/article234034207/Diese-Frau-will-Esperanto-nach-Braunschweig-bringen.html>

7. Dezember 2021  
**Harz-Kurier**

**Volontärin aus Toulouse arbeitet in Esperanto-Bibliothek Herzberg**  
Schade, leider wieder nur mit Bezahlschranke

<https://www.harzkurier.dellokales/herzberg/article234027631/Volontarin-aus-Toulouse-arbeitet-in-Esperanto-Bibliothek-Herzberg.html>



4. Dezember 2021  
**Die Presse**  
**Warum Englisch kein Esperanto ist**

Leider auch nur mit Bezahlschranke  
Ist die Dominanz des Englischen in Gefahr? Was macht Malaiisch so

beliebt? Und warum hat es das Deutsche so schwer? „In 20 Sprachen um die Welt“ liefert Antworten.

Mit einem Vergleich gesprochener Sprachen, gesondert als Muttersprache und als Zweitsprache  
<https://www.diepresse.com/6070003/warum-englisch-kein-esperanto-ist>



1. Dezember 2021

**Eine Sprache für alle (Seite 13) Künstlerinnen und Künstler weltweit verstehen die Kraft, die in der Weltsprache Esperanto liegt, und nutzen das. Von Pascal Dubourg Glatigny**

Esperanto ist an keinen Staat, keine Partei und keine Armee gebunden, und es hat sich weiterentwickelt, trotz der Versuche totalitärer Regime, es zu vernichten. Die Sprach-gemeinschaft hat einen Raum erzeugt, in dem einerseits Erzeugnisse der großen dominanten Kulturen sowie andererseits solche von Minderheitskulturen vermittelt werden, die teilweise vom Aussterben bedroht sind. Gleichzeitig hat die kollektive Erfahrung der Gemeinschaft eine eigene Kultur geschaffen, eine literarische, musikalische und künstlerische Geschichte. Sie zeugt vom Wunsch nach Austausch und von dem Willen, einen Ort zu haben, an dem die ethnischen Sprachen gleichberechtigt sind. Dieser Wunsch wurde manchmal als idealistisch und kurzlebig beschrieben, obwohl seine Wirklichkeit in der Praxis und auf lange Zeiträume angelegt ist.

[https://www.rosalux.de/fileadmin/rls\\_uploads/pdfs/maldekstra/Maldekstra\\_\\_13\\_low.pdf](https://www.rosalux.de/fileadmin/rls_uploads/pdfs/maldekstra/Maldekstra__13_low.pdf)



21. November 2021  
**Radio Prague International**  
**Ein jüdisches Schicksal: Gymnasialprofessor und Esperantist Hugo Jokl**

Hugo Jokl wurde 1891 in Pacov auf der Böhmisches-Mährischen Höhe geboren. Er war als Professor am tschechischen Gymnasium

in Wien tätig. Wegen seiner jüdischen Herkunft musste er 1938 nach dem Anschluss Österreichs Wien verlassen. Doch nicht einmal in seiner böhmischen Heimat entging er der nationalsozialistischen Rassenverfolgung.

<https://deutsch.radio.cz/ein-juedisches-schicksal-gymnasialprofessor-und-esperantist-hugo-jokl-8733753>

17. November 2021  
**MeinBezirk.at**

Kindergartenbetreuerin Andrea Lach schrieb mit „Lilu“ ihr erstes Kinderbuch. Sie greift darin das Sprachthema unter Kindern auf und verwendet teilweise die Weltsprache „Esperanto“.



Mit einem kleinen Video

[https://www.meinbezirk.at/voitsberg/c-leute/ein-kinderbuch-mit-esperanto-mit-video\\_a5014246](https://www.meinbezirk.at/voitsberg/c-leute/ein-kinderbuch-mit-esperanto-mit-video_a5014246)



15. November 2021


**Meetup**  
**Esperanto Conversation in Restaurant Lichtblick, Moabit**  
<https://www.meetup.com/de-DE/Speak-Learn-Esperanto-in-Berlin/events/kjbtjpyccpbt/>



18. Oktober 2021

**Hallo Pymont**  
**Esperantotreffen in Bückeburg und Porta Westfalica**


**Hameln. Bereits zum 18. Mal lud die Esperanto-Gruppe Hameln Freunde der internationalen Plansprache ein zum Rata Rendevuo (Ratten-Rendezvous). Dieses Mal traf man sich in Porta Westfalica und Bückeburg. Für einige war es das erste Treffen nach Beginn der Pandemie und so war die Freude groß, sich endlich persönlich wiedersehen zu können. Es kamen nicht nur Esperanto-Sprecher aus der näheren Umgebung, sondern auch aus Hamburg, Bremen, Kassel, Marburg, Duisburg, etc.**  
<https://www.hallo-hameln-pymont.de/esperantotreffen-in-bueckeberg-und-porta-westfalica/>





# 175-a naskiĝtago de la Esperanto-pioniro Ludwig Emil Meier

**Ludwig Emil Meier (1847 – 1919) estis nestoro de la germana Esperanto-movado kaj la fondinto de la unua munkena Esperanto-klubo.**



## La vivo de Ludwig Emil Meier

Ludwig Emil Meier naskiĝis la 16-an de februaro 1847 en Munkeno. Li partoprenis en la Prusa-Aŭstria milito en 1866 kiel reĝa-bavara kapitano.

Ekde 1883 Meier estis volapukisto (tio signifas ano de la planlingvo Volapuko), sed li fariĝis grava aktivisto por Esperanto. Li estas rigardata kiel nestoro de la germana Esperanto-movado. Jam en 1889 li konatiĝis kun Esperanto.

En la jaro 1891 Meier fondis la unuan Esperanto-klubon en Munkeno. Je la 3-a de januaro li skribis leteron al la redaktoro de „La Esperantisto“, la unua Esperanto-gazeto de la mondo. Ĉi tie estas eltirajo:

„Tre estimata Sinjoro!

Per tio ĉi mi Vin sciigas, ke hodiaŭ vespere 3 sinjoroj de nia urbo fondis klubon esperantistan, la unuan en tiu ĉi urbo. La societanoj alprenis la nomon „Societo Esperantista Mūnhen“ kaj komencos senpage instrui publike, korespondi kun aliaj kaj alilandaj Esperantistoj, simple diri: vastigadi la lingvon internacian kun fortoj unuigitaj.

La subskribitaj Esperantistoj Vin salutas!”

La klubo estis la dua laŭ la aĝo en Germanio kaj verŝajne mondvaste. Bedaŭrinde la societo disfalis baldaŭ post sia naskiĝo.

Ludwig Emil Meier translokiĝis de Munkeno al Nurenbergo kaj tie li daŭrigis la agadon por Esperanto. En 1903 li intencis fondi tutlandan asocion, sed je la alvoko, adresita al 100 esperantistoj, alvenis nur dek aliĝoj. Unu jaron poste Meier revenis al Munkeno; li fondis klubon kun la nomo „Esperantista Grupo Munhena“.

En la jaro 1905 li estis nomumita de Ludwig Zamenhof kiel membro de la unua Lingva Komitato. Ĝi estis sendependa lingva institucio, kies tasko estis konservi

kaj protekti la fundamentajn principojn de Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon.

En 1908 Meier iĝis idisto (tio signifas ano de la planlingvo Ido), sed du jarojn poste li revenis al Esperanto. Okaze de la 25-a Esperanto-jubileo en 1912 li festparoladis je la arango de la ses munkenaj Esperanto-grupoj.

Ludwig Emil Meier mortis la 1-an de januaro 1919 en Munkeno.

## La verkaro de Ludwig Emil Meier

La verkaro ampleksas lernolibron, literaturajn tradukojn, kantlibron, artikolojn en diversaj ĵurnaloj kaj gazetoj.

Meier verkis lernolibron kun la titolo „Vollständige der Internationalen Sprache Esperanto“ (Kompleta gramatiko de la internacia lingvo Esperanto). La unua eldono aperis en la jaro 1891 kaj la dua en 1903. La libro enhavas 128 paĝojn.

Ludwig Emil Meier tradukis inter alie la sekvantajn literaturajn verkojn en Esperanton: la dramon „Wilhelm Tell“ de Friedrich von Schiller (1906), la rakonton „Hochzeit auf Capri“ (Edziĝa festo en Capri) de la munkena Nobel-premiito Paul Heyse (1906), la novelon „Das Kloster bei Sandomir“ (La monaĥejo de Sandomir) de la aŭstro Franz Grillparzer (1907).

La „Esperantista Kantaro“ enhavas tradukojn de 50 germanaj kantoj. La unua eldono aperis en 1907.

Meier skribis artikolojn en diversaj ĵurnaloj, ekzemple „La Esperantisto“, „Revue Internacia“ kaj „Danubo“. Ankaŭ en la gazetoj „Münchener Neueste Nachrichten“ kaj „Neues Münchener Tageblatt“ aperis kontribuoj pri Esperanto.

### Ĉefaj fontoj:



„Ludwig Emil Meier“, artikolo en Vikipedio ([eo.wikipedia.org](http://eo.wikipedia.org))

„100 jarojn Esperanto en Munkeno“, Karl-Ernst Paech, 1991

**Norbert Gütter,**  
Esperanto-Klub München e.V.

Rimarko de la redakcio: La libro *Kvin Noveloj* elŝuteblas en pdf-formato ĉe:

[https://commons.wikimedia.org/wiki/File:EO\\_Kvin\\_Noveloj\\_esperantigitaj\\_la%C5%AD\\_germanaj\\_a%C5%ADtoroj.pdf](https://commons.wikimedia.org/wiki/File:EO_Kvin_Noveloj_esperantigitaj_la%C5%AD_germanaj_a%C5%ADtoroj.pdf)



# Terminaro Vintraj Olimpiaj Ludoj

**Okaze de la Vintraj Olimpiaj Ludoj en Pekino mi komplete tralaboris kaj pliampleksigis la fakvortliston, kiun mi publikigis antaŭ naŭ jaroj.**

Ekzistas du variantoj (germane – Esperante kaj Esperante – germane) kun ĉiujfoje ĉirkaŭ 1.900 vortoj/tradukoj. Por ĉiu termino oni trovas la fontindikon. La bazo (ĉ. 48 % de la vorttrezoro) estas la vortaroj de Erich-Dieter Krause.

La terminaro estas je via dispono sub la sekvanta interretadreso: [www.esperanto-muenchen.de/Fakvortlistoj/fakvortlistoj.html](http://www.esperanto-muenchen.de/Fakvortlistoj/fakvortlistoj.html).

Proponoj por plibonigo kaj plilarĝigo estos akceptataj danke (adreso: [informo@esperanto-muenchen.de](mailto:informo@esperanto-muenchen.de)).

Resp. [http://www.esperanto-muenchen.de/Fakvortlistoj/vintraj\\_olimpikoj/vinol-2022.pdf](http://www.esperanto-muenchen.de/Fakvortlistoj/vintraj_olimpikoj/vinol-2022.pdf) (rim. de la red.).

**Norbert Gütter,**  
Esperanto-Klub München e.V.

Jen specimena paĝo el la vortaro:

Fachwortliste Olympische Winterspiele	
<b>A</b>	nuligi
aberkennen	descendejo
Abfahrt	descendo
Abfahrt (Vorgang)	descendejo
Abfahrtschlag	descenda skiado
Abfahrtslauf	skidescendado
Abfahrtslauf (D)	descendokuro
Abfahrtslauf (E)	descenda skiisto
Abfahrtslauf (W)	malsuprenira skiado
Abfahrtsläufer	descenda skiisto
Abfahrtsläuferin (M)	descenda skiistino
Abfahrtski	descenda skio
Abfahrtski (D)	descendoskio
Abfahrtsstrecke	descendvego
Abfahrtsstrecke (W)	malsuprenirejo
abpfeifen (O)	fajfhaltigi
abpfeifen (O)	finfajfi
Abpiff	finfajfo
Abschlussstabelle (a)	fin ranglisto
Abschlusszeremonie (W)	fin ceremonio
abschts	ofsajdo
abschts	ofsajdo
abschtsentscheidung (W)	ofsajda decido
abschtslinie (U)	ofsajdlinio
abschtspiff	ofsajda fajfo
abschtsposition	ofsajda pozicio
abschtsregel	ofsajda regulo
abschtsstellung	ofsajda pozicio
abschtsstor	ofsajda golo
abspielen	pasigi
abspielen	transludi
abspielfehler (a)	pasigeraro
abspringen	desalti
abspringen (a)	eksalti
abspringen (a)	forsalti
Absprung	desalto
Absprung	forsalto
Absprung (D)	eksalto
Absprungpunkt (M)	eksalta punkto
Abwehr	defendo
Abwehr (Abwehrspieler)	arieruloj
Abwehr (des Torhüters / der Torhüterin)	parato
Abwehr (Spieler) (D)	defendantoj
abwehren	rebati
abwehren (parieren)	parati
Abwehrspieler	arierulo
Abwehrspielerin (a)	arierulino
Aerial (M)	movo en aero

# EBLOGO feiert Zamenhoftag

**Anlässlich des 100-jährigen Bestehens des Verbandes blinder Esperantisten in Deutschland (EBLOGO) fand am Zamenhofstag, den 15.12.2021 ein virtueller Esperanto-Abend per „Jitsi meet“ statt.**

Die Veranstaltung dauerte 3 Stunden und 53 Minuten, also fast 4 Stunden. Es waren nach 20 Uhr bis zu 26 Teilnehmer aus mehr als 8 Ländern zeitgleich zugeschaltet.

Nach Äußerungen mehrerer Personen wurde die themenfreie Zeit vor der offiziellen Festveranstaltung ab 20 Uhr als positiv und wünschenswert für die Zukunft eingestuft.

Es gab mehrere Grußworte in Schriftform, die von „Augenlesern“ und „Fingerkuppenlesern“ vorgelesen wurden und etwa 10 MP3- Einsendungen, die in kleinen Blöcken und Abgrenzung durch Esperantomusik in das Festprogramm eingearbeitet wurden. Die offizielle Jubiläumsveranstaltung wurde aufgezeichnet. Die Esperantoflagge, die Vase mit Blumenstrauß roter Rosen, das halbgefüllte Weinglas und die Weinflasche mit dem Etikett „Esperanto“ waren mit dem festlichem „Etošo“ im mitgesendetem Videobild erkennbar.

Die virtuelle und „reale“ Raumüberwachung und technische Begleitung hat Michaela Stegmeier aus Herzberg sehr hilfreich und in angenehmer Weise durchgeführt. Eine hartnäckige Bildstörung eines Teilnehmers konnte sie mit der Anregung, die Zimmerbeleuchtung versuchsweise einzuschalten, aufklären.

Frau Stegmeier hat auch die Grußworte des Deutschen Esperanto-Bundes in Vertretung vorgelesen. Dafür ein ganz besonderer Dank von EBLOGO an Michaela Stegmeier und an den Deutschen Esperantobund (DEB) für die hilfreiche Unterstützung! Es konnte sogar eine Lernpartnerschaft (Tandem) vermittelt werden, um eine Fremdsprache über die „Brückensprache“ Esperanto zu erlernen. Das dürfte etwa im ursprünglichem Sinne des Schöpfers der Plansprache Esperanto gewesen sein.

Gerne möchte ich für die Zukunft Optimierungen schaffen, denn „virtualaj eventoj“ haben viele nützliche Vorteile für blinde Esperantisten. Es entfallen dadurch die Reiseprobleme, Umsteige-probleme, die Unfallrisiken, die Reisezeiten, die oft schwierige Suche nach hilfreichen Reisebegleitungen und die Reisekosten u. a. m. Hiermit bedanke ich mich für die gute Zusammenarbeit mit dem DEB. Alles hat zu einem guten Gelingen der EBLOGO 100-jar-festo beigetragen.

Danke!

**Werner Groen**



# Kantoparado – pli ol unu jaro

Eble la pli aĝaj legantoj el vi memoras la ĉiusabatan ritualon por la infanoj en la 60aj kaj 70aj jaroj de la antaŭa jarcento: post ludado oni banis sin en bankuvo, vespermanĝis kaj rigardis televidon.

Unue iun usonan serion kun bestoj (*Daktari, Flipper, Skippy, Fury*, ktp.) kaj poste unufoje monate venis: „Die deutsche Hitparade im ZDF mit Dieter Thomas Heck“! – Ĉu vi memoras? Ĉefe oni aŭskultis ŝlagrojn kaj mi avide notis la kantistojn kaj scivolemismis, kiu gajnis en la voĉdonado (tiam ankoraŭ per poŝtkartoj) kaj povis veni ankoraŭfoje.

Pri tio mi pensis, kiam mi havis la ideon, ĉu ne eblas fari similan aferon ankaŭ per Esperanto-kantoj? Kaj mi invitis unue la klubanojn kaj poste ankaŭ la aliajn partoprenantojn de la virtualaj kunvenoj de la Ratkaptista Bando por sendi al mi proponojn de kantoj por la Kantoparado.


Kaj jam ekde pli ol unu jaro jam venas belaj kaj tre diversaj proponoj: tre aktualaj kantoj kaj belaj kantoj el la arkivo, kantoj prezentitaj en jutubaj filmoj aŭ kantoj el iu malnova kompaktdisko. Venas eĉ la kantistoj mem por prezenti siajn verkojn.

Ĉiu vespero dependas de la homoj, kion ili proponis. Mi ĉiam kolektas la proponojn kaj estas jam belaj kantoj sur la listo por la venontaj Kantoparadoj.

Ili okazas nun unufoje monate. Vi povas aŭskulti entute naŭ kantojn, tri, kiuj ricevis la plej multajn poentojn la pasintan fojon, kaj ses nove proponitaj kantoj.

Kaj post la aŭskultado kaj rapidaŭskultado ĉiu povas voĉdoni por siaj plej ŝatataj kantoj de la vespero: entute vi povas disdoni sep poentojn, sed maksimume nur kvar poentojn por unu kanto.

Per la retpaĝo ĉe *PollUnit* la voĉdonado estas sufiĉe rapide farita, sed tamen ni ankoraŭ atendas la homojn, kiuj sendas siajn poentojn per retpoŝto. Voĉdonis ĝis nun ĉiam inter 20 ĝis 40 homoj.



Kulmino estas – kaj ĉiuj scivoleme jam atendas: kiu kanto gajnas kaj estas la „Kanto de la tago“. Finfine dividado de la ekrano – kaj ĉiuj ekscias la gajnintojn. Kia surprizo! Ofte multaj ne pensis aparte pri tiu kanto.

Dum la pasinta jaro estis du grandaj favoritoj, du kantoj, kiuj post la unua fojo estis eĉ 5-foje reelektitaj. Temas pri „Haleluja“ de Manno Montanna kaj pri „Reklamo al silento“ de Team’. Sekvas kaj trifoje reelektitaj estis „Dankas mi la vivon“ de Manŭel kaj nun ankaŭ „Ĉu vi kontentas?“ de La Perdita Generacio.

Partoprenas kaj voĉdonas ne nur homoj el Germanujo, sed venis jam homoj el la plej diversaj landoj kaj eĉ kontinentoj!

En ĉiu kazo estas bone, ke venas ankaŭ proponoj de raraj kantoj, kiujn oni ankoraŭ ne konas, kantoj de la diversaj stiloj, de folkloro kaj klasiko ĝis rok- kaj popmuziko.

Koran dankon ankaŭ al Klaas Dijkstra, kiu tre lerte helpas por prezenti la kantojn sen reklamo. Ni kune nun ankaŭ provas aldoni subtekstojn al la kantoj, kiuj ankoraŭ ne havas ilin, por kunlegi la tekstojn dum la aŭskultado. Tio certe helpas ne nur al la komencantoj kompreni la enhavon.

Bonvenon ankaŭ al vi, al ĉiuj muzikŝatantoj, por partopreni la estontajn Kantoparadojn, ĉiam merkrede unufoje monate dum la virtualaj kunvenoj de la Ratkaptista Bando el Hameleno. Vidu ĉe <https://eventaservo.org/> (entajpu en la serĉkampon la vorton „Kantoparado“). Ĝuu kaj subtenu la Esperanto-muzikon!

**Heinz W. Sprick**

◀ Rimarko de la redaktoro, iama manaĝero de la grupo: La kanto aŭskulteblas ĉe: <http://stano-auskultebo.bplaced.net/index.htm#team>



TEAM': Reklamo al silento

Hmi Fmi Hmi Fmi Hmi Fmi  
 Televid' reklamas ja la silenton nun ĉiu jam ekflamas pro  
 bela oportun'. Al silent' reklamo vera furoraj'  
 importita silenteg' plej necesa aj'. Eblas en kas' la si-  
 lenton de arbar' havi por via dom'  
 estas garantio, indas la far' akirus ĝin plej ruza  
 hom'.

3 x D.C. al Fine

# Kalendaro

Jarŝanĝe 2021-22, nuligitaj

27-03 jan 2022: Wiesbaden, Germanio: Novjara Renkontiĝo. Komune festi la Novan Jaron. Informoj: [www.esperantoland.org/nr](http://www.esperantoland.org/nr).

28-03 jan 2022 (?): Münster (Westfalen), Germanio: Luminesk'. Jarfina kunveno de Germana Esperanto-Asocio. Informoj: <https://www.esperanto.de/de/luminesk>

Februaro 2022

26-05 mar: Les Issambres – Francio (Lazura Marbordo): Mediteranea Esperanto Semajno 2022 (M.E.S.) Informoj kaj aliĝoj: Monique Prezioso, 92 allée des Harkis, FR 83700 Saint-Raphaël, Francio. Rete: [prezmoni@hotmail.com](mailto:prezmoni@hotmail.com) – tel. +33 (0)4 94 83 06 88. Christine Graissaguel, Les Iles d'Or-A, 59 rue du Progrès, FR 83600 Fréjus. Rete: <https://eventaservo.org/e/MES2022>, kris\_grai@hotmail.fr – tel. +33(0)4 94 95 66 18

Marto 2022

03-06: Tilff, Belgio – Printempa Esperanto-Kunveno (PEKO). Informoj: <http://verdajskoltoj.net/peko/peko-2021/>.

16 – 20. Trier, Germanio: Bibliaj Tagoj. Temo: Ĉu bibliaj, ĉu duakanonaj, ĉu apokrifaj, sed tamen legindaj? La apokrifoj de Malnova Testamento. Aliĝilo: [http://keli.chez.com/tekstoj/alighilo2022\\_eo.pdf](http://keli.chez.com/tekstoj/alighilo2022_eo.pdf).

25-27: Bornerbroek, Nederlando: Esperanto-Studosemajnfino por komencantoj, komencintoj kaj progresantoj. Aliĝo: [studsemajnfino@esperanto-nederland.nl](mailto:studsemajnfino@esperanto-nederland.nl)

Aprilo 2022

01-05; Baugé-en-Anjou, Francio: Kunveno de fervojistoj AFCE IFEF, kadre de Erasmus+. Informoj: <http://laurent.lautre.net/afce/>

01-03: Art-sur-Meurthe, Francio. Komuna regiona semajnfino de Esperanto France Est en rilato kun Bavelo. Informoj: <http://esperanto.france.est.free.fr/>

08-10: Bartošovice, Ĉeĥio: Lernejo de Esperanto kun amuzaj programeroj en kastelo. Informoj: [verdastacio@gmail.com](mailto:verdastacio@gmail.com)

11- 18: Braunschweig, Germanio: 38-a Printempa Semajno Internacia (PSI) estas granda internacia renkontiĝo por la tuta familio. Ĝi okazas ĉiujare dum unu semajno ĉirkaŭ Pasko ie en Germanio. Rete: <https://psi.esperanto.de/eo/2022/#alighi>

22- 30: Baugé-en-Anjou, Francio – PRINTEMPaS: intensivaj kursoj kaj ekzamenoj 2022. Informoj: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

Majo 2022

06-11: Beroun, Ĉeĥio – 73-a IFEF-kongreso, Jarkongreso de fervojistoj: Informoj: <http://kongreso.wz.cz/>

12-16: Pardubice, Ĉeĥio – Postkongreso de IFEF. Informoj: <http://kongreso.wz.cz/postkongreso/>

25-29: Hameln, Germanio – 61-a BARO 2022. Plilongigata semajnfino sen fiksita programo, por amuziĝi. Kunportu viajn infanojn! Informoj: <https://krokodilo.de/baro/baro.php>

26-29: Trélissac, Francio – Kongreso de Esperanto France. Jara landa kongreso. Informoj: <https://esperanto-france.org/>

Junio 2022

03-06: Oldenburg (Oldenburg), Germanio – Germana Esperanto-Kongreso 2022 - Kunlabore kun Esperanto Nederland. Informoj: <https://www.esperanto.de/eo/gek2022>

11-19: Bazel, Belgio: 4-a BEMI-semajno, BEMI invitas ĉiujn ŝatantojn de biciklado al evento kun biciklaj ekskursoj taŭgaj por ĉiu nivelo. Informoj: <https://bemi.tejo.org/semajno/>

25-03 jul, Roskilde, Danlando – Roskilde Festivalo 2022, Festu kaj volontulu kun Esperanto-teamo en la granda publika festivalo. Informoj: <https://roskildefestivalo.wordpress.com/>

Julio 2022

04-08: Baugé-en-Anjou, Francio – 3-a Verda Naturisma Semajno en Greziljono, naturisma evento, inkluzivanta kursojn kaj amuzojn en unu el la ĉefaj esperantistaj lokoj en Francujo. Informoj: <https://gresillon.org/naturismo?lang=eo>

09-17: Klaipeda, Litovio – Baltiaj Esperanto-Tagoj BET-56, tradicia Baltia E-renkontiĝo. Informoj: <http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56&ckattempt=1>

16-23: Domaszék, Hungario – Kristana Kongreso / 71-a kongreso de KELI. Informoj: <http://keli.chez.com/tekstoj/2022.kongresa.alighilo.pdf>

Aŭgusto 2022

20-27: Westelbeers, Nederlando – 78-a Internacia Junulara Kongreso, IJK, Informoj: <https://ijk2022.tejo.org/>

20-28: Brescia, Italio – 89-a Itala Kongreso de Esperanto. Temo: Paco ne okazas hazarde: la aktiva rolo de ĝemelurbaj rilatoj en la konstruo de eŭropa popolo. Informoj: <https://kongreso.esperanto.it/89/>

Septembro 2022

16-18: Pardubice, Ĉeĥio – Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Informoj: <http://www.esperanto.cz/eo/akce/kongreso-de-e-a-esperanta-asocio-1339.html>

23-25: Ieper, Belgio – Beneluksa Kongreso – Korusopacfestivalo. Informoj: <https://www.esperanto.be/bef/>

Novembro 2022

11-13: Bornerbroek, Nederlando – Esperanto Studosemajnfino por komencantoj, komencintoj kaj progresantoj. Aliĝo: [studsemajnfino@esperanto-nederland.nl](mailto:studsemajnfino@esperanto-nederland.nl)

# Zamenhoffesto Vieno 2021

## La tradicia Zamenhoffesto en Vieno ankaŭ fine de 2021 okazis.

Pro la Koronavirusa pandemia situacio en Aŭstrio reala kunveno bedaŭrinde ne eblis. Do sabate, 2021-12-11 ekde la 17-a horo la kunveno okazis pere de Zoom..

### La prezentaĵoj estis:

- Hans Michael Maitzen pri sia nova libro pri Boltzmann
- Reinhard Fössmeier pri Esperanto-Klubo Munkeno
- Bernhard Tuider pri Kalocsay
- Internaciaj virtualaj kontaktoj al esperantistoj en la mondo, inter alie
  - o Felix Baur, aŭstrodevena civilservanto en Londono,
  - o Djofina Mungosi kaj Alphonse Waseka el DR Kongo (Afriko)
  - o Espoir Kasati el DR Kongo
- Alfred Heiligenbrunner pri AEF
- Petro Baláž pri E@I
- Hans Michael Maitzen pri historio de Esperanto en Aŭstrio en la 1960-aj jaroj

Partoprenis 46 homoj el 4 kontinentoj. AEF kore dankas al ĉiuj partoprenantoj kaj precipe dankas ĉiujn kontribuantojn.

Unu el la partoprenantoj en la virtuala Zamenhoffesto Vieno estis Alphonse Waseka Kamango. Li loĝas en Goma, DR Kongo. Li reprezentis kaj prezentis la organizon Solidareco Bona Volo (SBV).

## Solidareco Bona Volo, Afriko

1. Historio de Solidareca Bonvolo, SBV  
SBV estis kreita en 2004, iniciate de geesperantistoj de Goma, en la Norda Kivu provinco/DR Kongo.

### La celoj estas:

- La flegado de orfoj, stratinfanoj, gejunuloj el malriĉaj familioj,
- Batalo kontraŭ la malriĉeco
- Edukado de malriĉaj homoj, ĉefe infanoj
- Disvastigo de Esperanto.**  
Kion ĝis nun SBV estas faranta? Ĉiu, kiu ricevas subtenon por la edukado samtempe lernas de ni Esperanton. Kaj konsciigon pri la homaj rajtoj.

La agado de SBV de la komenco ĝis nun eblas danke al la subteno de geesperantistoj. Siatempe tiuj estis Pastro Duilio Magnani el Italio, Hans Bakker el Nederlando, k.a.

Iom poste, en la jaro 2012, venis Koreoj, Pedro Hernandez el Hispanujo, Penny VOS el Aŭstralio k.a. Tiuj plifortigis nian agadon kaj ebligis la konigon de nia asocio en internaciaj Esperanto-medioj.

Danke al la subteno de geesperantistoj, SBV subtenadis/as malriĉajn familiojn, mizerajn gejunulojn. Tiuj ĉi ricevas de SBV monon por la edukado ĉe la baza lernejo, mezlernejo kaj ĉe la universitato. Dume familioj ricevas monon por lui loĝejon, kaj SBV subtenas kiam okazas malsanoj.

### 1. Atingoj de Solidareca Bonvolo

Helpe de SBV junuloj jam akiris 25 ŝtatajn kaj 18 universitatajn diplomojn. Tiuj estis en diversaj fakoj, librotendado, financoj, sociologio, politika scienco ktp

En tiu ĉi kuranta studjaro, SBV subtenas 28 bazajn lernejojn. Ilia situacio pri la lernejoj kotizoj jam estas savita danke la subteno de Penny VOS.

En la mezlernejo ni havas 39 subtenitojn, inter kiuj nur kvar havas subtenantojn. Nunjare ni pagas 250\$ po mezlernejo.

Ĉe la universitato ni havas deksep studentojn. Dek el ili jam havas subtenantojn el Hispanujo, Germanujo (Eŭropo). Inkluzive de Djofina Mungosi, kiun subtenas aŭstraj esperantistoj.

### 2. Strategioj de Solidareca Bonvolo

En 2018 SBV alfrontis malbonan financon situacion. Ĉar jam en 2010 kaj 2015 forpasis du el la plej gravaj bonfarantoj. Temas pri Duilio Magnani kaj Hans Bakker. Samtempe aliaj bonfarantoj pro familiaj bezonoj kaj diversaj kialoj, ne plu kapablis daŭre subteni la agadon de SBV.

SBV starigis projekton por la financa sendependiĝo de subtenitoj. Du grupoj estis starigitaj. Temas pri MAMA WIMBI kaj KIJANA WIMBI. La unua (MW) konsistas el 13 virinoj inkluzive gejunuloj kiuj lernis la kudradon. Kaj kudris unue buntajon, de kiu amikino Penny VOS vendis parton en Aŭstralio kaj la enspezo helpis por la edukado de la geknaboj.

Dum la grupo KIJANA WIMBI konsistas el gejunuloj, kiuj celis la entreprenadon. Ambaŭ grupoj celas financon sendependiĝon de subtenitoj de SBV por eviti kaoson kiam bonfarantoj/geesperantistoj ne povas subteni ilin pro iuj kialoj.

La grupo de gejunuloj por la entreprenado nomiĝas „KIJANA WIMBI“. Danke al subteno de korea amiko jam entrepreneto pri informadiko starigis, kie gejunuloj kunlaboras kaj gajnas iom da enspezoj. Kiel vi eble rimarkas, SBV bezonas subtenon el geesperantistoj. Povas esti konigo de nia agado en aliaj medioj, povas esti individua subteno aŭ klopodoj ĉe neesperantistaj organizaĵoj. Tio plifortigos SBV kaj helpas mizerulojn.

### Eblecoj por helpi la agadon de Solidareca Bonvolo:

- La eblecoj por subteni SBV estas ĉe neesperantistaj organizaĵoj. Iam ajn ja iu pretas klopodi.
- La organizaĵo ROTARIO povas esti organizaĵo, kiu subtenus SBV. Tiu ĉi ekzistas en multaj landoj tra la mondo.
- Konigo de nia agado perrete ktp  
Koran dankon.

**Informoj:** Facebook: Solidareca Bonvolo; retejo: <https://www.bonvolo.net/>; retmesaĝoj: [sv.asocio@gmail.com](mailto:sv.asocio@gmail.com); Banko: SOLIDARITE BONNE VOLONTE, SBV; konto: 00018-00028-00041591200-37; Swift: BCDCCDKI (BANQUE COMMERCIALE DU CONGO)

2022-01-14  
Alfred Heiligenbrunner kaj Alphonse Waseka Kamango

# Boltzmann, la germana profesoro

En la jaro 1905 la aŭstra fizikisto Ludwig Boltzmann veturis de Vieno al Usono. De tio li kreis vojaĝ-notojn, en kiuj li titolis sin „germana profesoro“.

Tio kompreneblas en la senco „germanlingva profesoro“. Lia lingvo tamen estis la aŭstra-germana. Tion montras la uzado de vortoj „Erdäpfel“, „Nockerl“, „Geselchtes“ k.a. Jen eltiro el la libro „Boltzmann – vojaĝo de germana profesoro“, kiu ilustras tion.

Ĉar mi jam plurfoje estis en Ameriko, unufoje en Konstantinopolo, Ateno, Smirno kaj Alĝerio, ne mankis sekve ankaŭ sugestoj, publici kelkajn el miaj dumvojaĝaj travivaĵoj. Al mi ĉio tio ŝajnis tamen tro etsignifa; sed mia lasta vojaĝo al Kalifornio tamen estis io sufiĉe elstara kaj do estu riskata eta babilado pri ĝi.

Mi neniel intencas esprimi, ke nepras vojaĝi al Kalifornio por vidi ion interesan kaj belan kaj por plezurigi. Oni povas ankaŭ turisme en la bela montaro de nia patrujo senti tiom da entuziasmo kaj ĝojo, kiom trovas lokon en homa brusto. Oni povas ĉe simpla manĝo senti plezuron kiel reĝo, sed vojaĝo al Kalifornio estas ĉampano *veuve Cliquot* kaj ostroj.

La unua parto de mia vojaĝo okazis sub la signo de hasto kaj haste ĝi ankaŭ rakontiĝu.

Ankoraŭ la 8-an de junio mi ĉeestis la jaŭdan kunsidon de la Viena Akademio de la Sciencoj laŭ kutima maniero. Dum la foriro kolego rimarkis, ke mi ne kiel ĉiam turnis min al la Bäckerstraße, sed al la Stubenring kaj demandis, kien mi iras. Al San-Francisko, respondis mi lakone.


En la restoracio de la Nordokcidenta stacidomo mi ankoraŭ tutagrade konsumis porkidan rostaĵon kun brasiko kaj terpomoj, akompane de kelkaj glasoj da biero. Mia nombra memoro, alikaze tolereble firma, ĉiam malbone tenas la nombron de bierglasoj.

Neniu iom sperta vojaĝanto miras, ke mi parolas pri manĝado kaj trinkado. Tio ne nur estas ne sensignifa faktoro, kontraŭe ĝi estas la pivota punkto. Plej gravas dum vojaĝo konservi la korpon sana kontraŭ la multspecaj nekutimaj influoj kaj aparte la stomakon, precipe la dorlotitan vianan stomakon. Neniu vianano senemocie manĝos la lastan gulaŝon kun nokoj, kaj kiel la sviso koncentras sian nostalgion al rememoro pri melk-logaj kantoj kaj gregaj sonoriloj, tiel la vianano pri fumaĵita viando kun buloj. „Ne diru, ke la aĝo igas min infaneca, ĝi simple trovis min ankoraŭ kiel veran infanon“.

El la libro „Vojaĝo de germana profesoro al Eldorado“ de Ludwig Boltzmann, tradukita de Hans Michael Maitzen.

ISBN 9788088326199. “Rimarko: Traduko en la anglan legeblas tie-ĉi: [https://homepage.univie.ac.at/walter.kutschera/Boltzmann\\_Reise%20ins%20Eldorado\\_English%20translation.pdf](https://homepage.univie.ac.at/walter.kutschera/Boltzmann_Reise%20ins%20Eldorado_English%20translation.pdf)

Im Jahr 1905 reiste der österreichische Physiker Ludwig Boltzmann von Wien in die USA. Davon erstellte er Reisenotizen, in denen er sich als „deutscher Professor“ bezeichnete.



Das ist im Sinne von „deutschsprachiger Professor“ zu verstehen. Seine Sprache war dennoch das österreichische Deutsch. Das zeigt der Gebrauch der Worte „Erdäpfel“, „Nockerl“, „Geselchtes“ u.a.

Hier ist ein Auszug aus dem Buch „Boltzmann – Reise eines deutschen Professors“, der das illustriert.

Da ich schon mehrmals in Amerika, einmal in Konstantinopel, Athen, Smyrna und Algier war, so fehlten mir auch nicht Aufforderungen,

einige von meinen Reiseerlebnissen drucken zu lassen. Mir erschien alles doch zu unbedeutend; aber meine letzte Reise nach Kalifornien war schon eher etwas Exquisites und so soll denn eine kleine Plauderei darüber gewagt sein.

Ich will beileibe nicht etwa sagen, daß man durchaus nach Kalifornien reisen müßte, um Interessantes und Schönes zu sehen und sich zu freuen. Man kann auch bei einer Tour in den schönen Bergen unseres Vaterlandes so viel Lust und Freude empfinden als in einer Menschenbrust Platz hat. Man kann bei ganz einfachem Mahle so vergnügt sein wie ein König, aber eine Reise nach Kalifornien ist Champagner *veuve Clicquot* und Austern.

Der erste Teil meiner Reise stand unter dem Zeichen der Eile und in Eile soll er auch erzählt sein. Noch am 8. Juni wohnte ich der Donnerstagssitzung der Wiener Akademie der Wissenschaften in gewohnter Weise an. Beim Fortgehen bemerkte ein Kollege, daß ich nicht wie sonst nach der Bäckerstraße, sondern nach dem Stubenring mich wandte und fragte, wohin ich gehe. Nach San Franzisko antwortete ich lakonisch.

Im Restaurant des Nordwestbahnhofes verzehrte ich noch in aller Gemütlichkeit Jungschweinsbraten mit Kraut und Erdäpfeln und trank einige Gläser Bier dazu. Mein Zahlengedächtnis, sonst erträglich fix, behält die Zahl der Biergläser stets schlecht.

Kein einigermaßen Reisekundiger wird sich wundern, daß ich über das Essen und Trinken spreche. Es ist nicht nur kein unwesentlicher Faktor, es ist vielmehr der Angelpunkt. Das wichtigste auf der Reise ist, den Körper der ganzen Mannigfaltigkeit ungewohnter Einflüsse gegenüber gesund zu erhalten und vor allem den Magen, gar den verwöhnten Wienermagen. Kein Wiener wird ungerührt das letzte Gollasch mit Nockerl essen und konzentriert der Schweizer sein Heimweh in der Erinnerung an den Kuhreihen und die Herdenglocken, so der Wiener an das Geselchte mit Knödel. „Sagt nicht, das Alter machte mich kindisch, es fand mich eben noch als ein wahres Kind.“



# Iom pri Esperanto-bibliotekoj kaj fakarkivoj

Nia komuna celo estas: savado de (historiaj) Esperanto-kulturvaloraĵoj.

## A) Kelkaj el la plej grandaj resp. gravaj Esperanto-bibliotekoj en la mondo

La savado de niaj kulturvaloraĵoj estas aktuala kaj grava temo en la ŝanĝiganta mondo kaj la eventuala perdo de nia skribita literaturo, konservado de paperaj libroj, gazetoj donas al ni taskojn hodiaŭ. Ofte mankas aktualaj kaj kompletaj listigoj pri niaj havaĵoj kaj tio devus instigi nin al bona kunlaborado, se ni volas sekurigi la plej diversajn Esperanto-kolektaĵojn en muzeoj, bibliotekoj, arkivoj, privatposedoj, ktp. Interŝanĝoj kaj komunaj esploradoj principe eblas. La plej multaj fakbibliotekoj agas sur bazo de komunitala laborado, do kun helpo de volontuloj, honoroficaj helpantoj.

Estus ĝojiga afero, se ene de kelkaj jaroj ni komune povos liveri pli konkretajn katalogojn kaj listigojn kun konkretaj nombroj, titoloj, aŭtoroj, paĝnombroj, specoj, mezuroj, ktp, ekz. kiom da originalaĵoj kaj multoblaĵoj ekzistas.

Ĉiuj Esperanto-kolektaĵoj savas la kulturvaloraĵojn kaj helpas por esplordoj, instruado kaj klerigado. Ne estu iu ajn miskompreno aŭ ebla sentemo, ĉar ni ĉiuj ja strebas je ordigadoj kaj nepraj konservadoj. Dum multaj jaroj ni vizitetis diversajn Esperanto-kolektaĵojn en pluraj landoj. La sekva listo ne estas kompleta, nur eta resumo.

## Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno

Certe ĝi estas la plej frua kaj plej ampleksa Esperanto-Biblioteko en la mondo. Danke al la iniciatoro Hugo Steiner ĝi fariĝis parto de la Aŭstra Naciobiblioteko kaj nun troviĝas kiel fama Esperanto-Muzeo en Palaco Mollard meze en la urbocentro de la bela ĉefurbo Vieno. Certe vi jam foje vizitis ĝin. Gvidadoj eblas. Danke al la senlacaj aktivuloj oni eĉ regule skanas multajn gazetojn, librojn.

## Biblioteko Hector Hodler en la domo de UEA en Roterdamo/NL

Unu el la plej konataj kolektaĵoj estas la Esperanto-Biblioteko Hodler en Roterdamo kun dekmiloj da unuaj, libroj, gazetoj, sonmaterialoj, fotoj kaj aliaj valoraĵoj. Ĝi estas uzebla surloke, aŭ mendante fotokopiojn.

## Biblioteko Montagu C. Butler (fond. 1905)

Kiel ni scias, ĉe Wedgwood Memorial College en Barlaston, apud Stoke-on-Trent de multaj jaroj oni kolektas

kaj ordigas ĉiujn materialojn. Ekstis grandegaj kolektaĵoj de libroj, jarkolektoj de revuoj, sondokumentoj, fotoj, ktp., kiuj estas je dispono post antaŭanonco de vizito.

## Germana Esperanto-Biblioteko Aalen

La iama Germana Esperanto-Instituto jam tre frue kolektis ĉiujn eldonaĵojn – ĉefe librojn kaj gazetojn – rilate al Esperanto. Post detruoj, malbonaj kondiĉoj pro la du mondmilitoj, tre ĝojiga afero estis, ke la evangelia pastoro Adolf Burkhardt tre aktive kolektis kaj reordigis ĉiujn materialojn. Tio estis granda laborado. Post lia morto la aktiva Esperanto-grupo en Aalen tre dankinde daŭrigis la gravan prizorgadon de tiu biblioteko. Privatuloj kaj heredaĵoj helpis ampleksigi la materialojn kaj certe elkreskis unu el la plej abundaj kolektaĵoj de libroj kaj gazetoj en la mondo. La biblioteko troviĝas en moderna konstruaĵo de urbo Aalen en Sudgermanio.

## Novaj grandaj defioj en Ĉinio

En centra parto de Ĉinio ĉe fama trajnkruvoĵo oni fondis kaj kreas la plej grandan Esperanto-muzeon en la mondo, evidente ankaŭ en la funkcio de Esperanto-informcentro.

## Bibiloteko de Japana Esperanto-Instituto

Ni ĝojas, ke japanaj esperantistoj povis aĉeti propran Esperanto-Domon en centra parto de la grandega urbo Jokohamo. Regule ni ricevas de tie informilojn, kie ni legis, ke la librokolektaĵo antaŭnelonge superis pli ol dekmil diversajn titolojn en Esperanto. Gratulon al la aktivaj kaj solidaraĵoj japanaj esperantistoj, kiuj komune celstrebte interaktivadas.

## Esperanto-Biblioteko, arkivo ĉe Germana Esperanto-Centro en la Esperanto-urbo

Dum kvardek kvin jaroj ekzistas la aktiva Esperanto-Societo Sudharco, kun sidejo en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo. De la komenco estas kolektataj la plej diversaj Esperanto-materialoj, kaj de loka privatulo kaj aparte de la asocio.

La grandaj kolektaĵoj troviĝas ĉe la Germana Esperanto-Centro (ICH) en Grubenhagenstr. 6 en la subtegmentejoj salonoj, ĉambroj. En la teretaĝo troviĝas aparta libro-kolektaĵo, t.n. „manbiblioteko“. Ni posedas multajn inkunablojn kaj rarajojn.

Plua granda materialstoko, ĉefe la duoblaĵoj de libroj kaj gazetoj, troviĝas en du subtegmentejoj ĉambroj de la Malnova Urbodomo.

Danke al la permeso de la urbo, en la domo de la iama baza lernejo de Herzberg-Sieber ni trovis bonan lokon por la unika Esperanto-libraro en brajlskribo, kaj krome ni povas stoki tie multajn aliajn konservindajn materialojn.

Nia kolektlaboro servas ne nur la bezonon je Esperanto-kulturkonservado, sed ĉio estas je dispono por instruado, klerigado kaj ofte por sciencaj esplordoj. La materialoj



estas ordigitaj laŭ temoj, tipoj por plifaciligi la organizadon de specialaj fakaj ekspozicioj en la urba muzeo en la Welf-kastelo, kie la interesaj, valoraj aperas publike kaj taŭge informas kaj pri la historio de nia lingvo, pri la Esperanto-movado kaj pri la nuntempaj uzeblaj, uzkampoj.

Estas ĝojige, ke ankaŭ la publika urba biblioteko fariĝis iusence montrofenestro por Esperanto-kulturo. De kelkaj jaroj jam ekzistas tie longa bretaro ĉe la muro kun esperantlingvaj libroj. Parton de la bretaro ni povas uzi ankaŭ por porokazaj libro-ekspozicioj, prezenti tie historiajn aŭ freŝajn eldonaĵojn. Dum la malfermhoroj oni povas viziti la bibliotekon kaj rigardi la librojn, gazetojn. Unu el niaj baldaŭaj celoj estas kunligi la liston de la tiea Esperanto-librostoko kun la urba librokatalogo de pruntepreneblaj libroj.

## B) Esperanto-Arkivejoj

Certe ekzistas diversaj kolektaĵoj dise en la mondo, ofte ankaŭ ĉe privataj kolektantoj. Bedaŭrinde la nombro de aktivaj specialkolektantoj malkreskis dum la lastaj jardekoj.

Ofte esperantistoj diras, ke ja temas nur pri ŝatata kolekta hobia de privatuloj.

Laŭ ni ege gravas savi la riĉajn multflankajn kulturvaloraĵojn, kiuj grandparte ankoraŭ ne estas esploritaj. Belaj esceptoj ankaŭ ekzistas, nome la aktiva samideano Bert Boon en Belgio, kiu detale esploras monerojn kaj medalojn rilate al Esperanto. Li memstare regule eldonas ampleksan senkoston retan fakgazeton „Esperanto Numismatiko“.

Same la Esperanto-filatelistoj sub la prezidanteco de Elda Doerfler el Triesto en Italio dum jardekoj tre serioze esploras la tre gravan temon kaj eĉ eldonas regulan interesan fakgazeton por abonantoj, resp. membroj. Same la fakorganizaĵo ELF-AREK estas komune administrata danke al kelkaj aktivaj prizorgantoj.

## C) Unika multflanka Esperanto-arkivaro en la Esperanto-urbo

Certe nia urbo ne havus la oficalan kromnomon „Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo“, se ni ne havus kelkajn unikajn daŭreprovajn Esperanto-servojn.

La plej multaj Esperanto-kolektaĵoj ĉefe okupiĝas pri libroj, gazetoj, kongresfotoj, ktp.; ni kolektas ĉion rilate al Esperanto, do estas ankaŭ eta muzeo.

Ĉe ni troviĝas – el kelkaj materialoj verŝajne la plej ampleksaj – Esperanto-fakkolektaĵoj:

libroj en brajlskribo, historiaj turismaj broŝuroj el la tuta mondo, medaloj kaj pingloj, glumarkoj, malnovaj filmoj en diversaj formatoj, sonmaterialoj (ĉefe kun savendaj kantoj sur diversteknikaj sonportiloj).

Verŝajne ankaŭ la sekvaj specialkolektaĵoj apartenas al la plej grandaj en la mondo:

larĝskala filatelo, historiaj fotoj, historiaj bildkartoj, lumbildoj, gazetartikoloj, varbskribiloj, sakoj, ktp.

## D) Volontula, honorofica laboro en la biblioteko

Kiel ni jam menciis, grandan parton de la biblioteka, arkivada laboro, faras bonvolemaj helpantoj, volontuloj, kiujn ni bonvenigas ankaŭ en la Esperanto-Centro en Herzberg.

Danke al la Eŭropa Volontula Servo kaj nia kunlaboro en internacia projekto, dum kelkaj monatoj helpis nian laboron Jade Joannot el Francio. La rezulto de la lastmonataj laboroj estas bone videbla sur la bele ordigitaj bretoj, plenigitaj de novalvenintaj materialoj.

**Elkoran dankon ankaŭ al la multaj donacintoj, ĉefe nuntempe el Germanio, Belgio, Nederlando, Hungario kaj Skandinavio!**

Stagantoj povas multe spertiĝi pri Esperanto, ĝiaj literaturo, movadhistorio, ktp. laborante inter libroj, gazetoj, arkivendaĵoj, kaj ni povas profiti el ilia ordiga, kataloga laboro. Ni esperas daŭrigi la kunlaboron internacivele. Novaj helpantoj, stagantoj estas bonvenaj!

▼ Nove ordigitaj bretoj en la ICH-biblioteko.





## Informado pri Esperanto al lernejestroj

Ĉu baldaŭ pluaj praktikaj Esperanto-paŝoj en nia regiono Göttingen?

Pro la fakto, ke la multflankaj konstantaj Esperanto-agadoj en la Esperanto-urbo Herzberg elradias en la regionon, ankaŭ diversaj partioj kaj la administracio de nia distrikto Göttingen pli kaj pli interesiĝas pri niaj longjaraj sukcesaj aktivecoj kaj prospektivaj modelvojoj.

De novembro 2021 ni havas kaj en nia urbo Herzberg kaj en la distrikto Göttingen novajn politikistojn, kiuj havas novajn laborcelojn. La nova urbestro de la Esperanto-urbo Herzberg fariĝis sinjoro Christopher Wagner. Certe ni ankoraŭ aŭdos multe pli.

Hodiaŭ ni nur volas aparte informi vin pri unu el la unuaj novaj laborpaŝoj. En novembro 2021 la distrikto Göttingen organizis la kutiman tutjaran konferencon por ĉiuj lernejestroj de mezaj lernejoj, gimnazioj kaj profesiaj lernejoj. La Germana Esperanto-Centro en Herzberg ricevis pro la estontaj konceptoj de nia regiono specialan prezentinviton kaj por la Zoom-konferenco kune kun la estroj de la profesiaj lernejoj kaj aparte kun tiuj de la mezaj lernejoj kaj gimnazioj.

Peter Zilvar prezentis la avantaĝojn de la neŭtrala kaj racia lingvo Esperanto kune kun unika prospektiva vojo. Aldone Zsófia Kóródy montris taŭgajn bildmaterialojn pri sukcesa lerneja Esperanto-instruado, projekttagoj, internaciaj lernejoj kunlaboroj. Ni dankas al la GEA-estraro pro la subteno, precipe al Ulrich Brandenburg, kiu lerte respondis kelkajn demandojn flanke de la sekiestrinoj de la distrikta administracio en Göttingen kaj flanke de la lernejestroj. En nia distrikto troviĝas multaj urboj kaj urbetoj, ekzemple Hann. Münden (proksime al la grandurbo Kassel), la universitata urbo Göttingen mem, Duderstadt, Osterode am Harz, Bad Lauterberg, Bad Sachsa, ktp., en kies lernejoj Esperanto povus aperi kiel speciala oferto.

Evidente ĉie mankas Esperanto-fakuloj kaj lingvoinstruistoj por Esperanto. Tamen ni ofertis, ke ni povos trejni en nia distrikto Göttingen po lernejo almenaŭ du lingvoinstruistojn en formo de seminarioj kaj ankaŭ perrete. Tiam ili eble post certa tempo mem povos instrui Esperanton dum po tri aŭ kvar instruhoroj semajne, simile kiel okazas la instruado de la itala, latina kaj hispana lingvoj.

Por dokumenti la mezureblajn lernpaŝojn ni povos oferti ekzamenojn laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) resp. de Germana Esperanto-Instituto.

Certe la definitivaj paŝoj ankoraŭ daŭros kelkajn monatojn, ekz. pro la lernejoj semestroj kaj administracia organizado.

La realigado de Esperanto-infrastrukturo por la tuta distrikto denove estas elstara kaj modela defio. La organizado restos ĉe nia Esperanto-Centro en Herzberg. Ĝoju kune kun ni pri la multaj unikaj bonŝancoj.

Por multaj malnovaj kaj eĉ novaj celoj kaj konstantaj taskoj ni bezonas kaj bezonos kompetentajn honoroficajn Esperanto-geamikojn.

Bv. baldaŭ kaj senpere kontakti nin skribe aŭ telefone: 05521-5983.

Anticipo ni kore dankas al vi.

## LEB-Planungsbogen 2022 der Esperanto-Gesellschaft Südharz in 37412 Herzberg am Harz

Themen Allgemeine Bildung online ab 04.01.2022 (dienstags) von 19:00 h – 21.00 h

### Programmübersicht:

25.01.22 Was hat Johann Wolfgang von Goethe für die deutsche Sprache und Kultur geleistet? Kion atingis Johann Wolfgang von Goethe por la germana lingvo kaj kulturo?

01.02.22 Was kann grundsätzlich jeder Mensch im Sinne der Gemeinnützigkeit leisten? Kion principe ĉiu homo povas kontribui en la senco de la komunutileco?

08.02.22 Der Nationalpark Harz hat ein großes Serviceangebot. Wir forschen nach. La Nacia Parko Harz havas grandan servooferton. Ni esploras pri tio.

15.02.22 Weder arme noch reiche Bürger, etc. Große Ideen von Silvio Gsell. Nek malriĉaj nek riĉaj civitanoj, ktp. Grandaj ideoj de Silvio Gsell.

22.02.22 Die Idee der Friedensarbeit. Welche Organisationen gibt es? La ideo pri pacolaborado. Kiuj organizaĵoj ankoraŭ ekzistas?

01.03.22 Ökodörfer, moderne Lebensgemeinschaften, etc. (Modelle für eine strukturverbesserte Zukunft?) Ekovilaĝoj, modernaj vivkomunumoj, ktp. (Modeloj por strukturplibonigota estonteco resp. t.n. alternativa vivkoncepto?)

08.03.22 Internationaler Frauentag Internacia virinotago

15.03.22 Bekannte Wanderwege im Harz. Waren Sie schon mal dabei? Konataj migradoj en la Harz-regiono. Ĉu vi jam foje ĉeestis resp. kunmigris?

22.03.22 Wie könnte ein internationaler Chor für unsere Region gestaltet und organisiert werden? Kiel oni povus organizi internacian koruson por nia regiono?

29.03.22 Die FUEN – eine europäische Organisation für Sprach- und Minderheitenrechte. FUEN – Eŭropa organizaĵo por lingvaj kaj minoritataj rajtoj.

05.04.22 Die europäische Idee der „Zukunftswerkstatt“ für alle Orte und Regionen. La eŭropa ideo pri „Futurateliero“ por ĉiuj regionoj kaj ĉiuj lokoj.

12.04.22 Welche Schlösser und Klöster gibt es im Landkreis Göttingen? Kiuj kasteloj kaj monaĥejoj ekzistas en la distrikto Göttingen?

19.04.22 Welche Bäume und Sträucher sollten wir anpflanzen? Kiuj arboj kaj arbedoj ni devus planti?

26.04.22 Welche Frühlingslieder kennen wir? Kiuj printempkantojn ni konas?

03.05.22 Was können wir in unseren Gärten anbauen? Kion ni povas kultivi resp. kreskigi en niaj ĝardenoj?

10.05.22 Welche Feiertage gibt es in Deutschland bzw. in den einzelnen Bundesländern? Kiuj festotagoj ekzistas en Germanio resp. en la unuopaj federaciaj landoj?

17.05.22 Was sammeln Sie bewusst oder unbewusst? Fast alle sammeln was. Kion vi kolektas konscie resp. nekonscie? Preskaŭ ĉiu kolektas ion. (Daŭrigota venonnumere)

## Nia kongresa temo: daŭripovo

En 2020 aperis „Gvidilo al la 17 Celoj por daŭripova evoluigo de Unuiĝintaj Nacioj“, eldonita de Mondial en kunlaboro kun Universala Esperanto-Asocio.

La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj la 8-an de septembro 2015 lanĉis la 17 Celojn (kun subceloj kaj kelkaj detalaj planoj) kiel bazon por sia evoluiga strategio dum la periodo 2015-2030. Ankaŭ en la publika debato „Daŭripovo“ kaj „daŭripova evoluigo“ lastatempe fariĝis multe uzataj terminoj. Kion ili signifas?

La germanlingva esprimo „Nachhaltigkeit“ aperis jam en la 18-a kaj 19-a jarcentoj kaj origine celis mastrumadon de arbaroj. Arbarposedantoj kutimas plani en tre longa perspektivo. La principo estas, ke oni ne „rikoltu“ pli da arboj ol rekreskos, eĉ se tio daŭros jardekojn. Hodiaŭ sur la tero loĝas pli ol 7,8 miliardoj da homoj, kiuj – simple dirite – kune foruzas pli ol povas rekreski. Pli da preskaŭ ĉio. Jam en 1972 tiun problemon priskribis la „Klubo de Romo“, kiam ĝi avertis pri la limoj de ekonomia kreskado. Evidente temas ne nur pri la foruzado de limigitaj resursoj, sed ankaŭ pri kreskanta malegaleco kaj malpurigo de la natura medio. Temo por UN – kompetenta por reguli tutmondajn aferojn, kvankam ne tutmonda registaro – daŭripovo fariĝis per la raporto „Nia komuna estonteco“ de la Brundtland-Komisiono en 1987. Ĝi poste eniris la t.n. „Jarmilajn celojn“ (2000-2015) kaj laste la menciitajn 17 Celojn por la periodo ĝis 2030.

En diversaj formoj daŭripovo kaj specife la 17 Celoj ankaŭ eniris nacian leĝdonadon (foje eĉ en formo de konstitucia celo) kaj planadon. Ekzistas sistemo de regula raportado, kiu montru la respektivan progreson (aŭ almenaŭ la klopodojn: pri malprogreso neniu volonte raportas). Plej preme lastatempe fariĝis la misevoluo, kiu kondukas al sentebla ŝanĝo de la monda klimato, kaŭzanta kreskon de la mezuma temperaturo, degelon de glaĉeroj, altiĝon de la marnivelo, katastrofojn pro sekeco aŭ pluvegoj ktp.. Klimato estas unu el la ĉefaj temoj, ekzemple de la koalicia kontrakto, sur kies bazo elektigis la nova germana registaro. La temo „daŭripovo“ do estas aktuala. Ĝi vekas intereson kaj eĉ emociojn. Sed kiel ĝi rilatas al Esperanto, kaj kial trakti ĝin kiel ĉefan temon de nia ĉi-jara kongreso kaj la german-nederlanda Erasmus+ -projekto, kiu akompanas ĝin?

La 17 Celoj – kiel skribas Humphrey Tonkin en la antaŭparolo por la menciita gvidlibro – entute ne mencias la lingvan demandon kaj certe ne aludas al Esperanto: „Aliflanke, se ni ne estas esperantistoj nur por esti esperantistoj, sed efektive volas krei pli bonan kaj pli egalecan mondon, la Celoj donas al ni vojon, kie ni povas



konversacii kun tiuj aliaj personoj, kiuj same celas pli bonan estontecon – ĝuste la homoj pli malfermaj al nia ideo pri internacia lingvo. La Celoj donas al ni vojon montri kion la Esperanto-movado, kun siaj malfermitaj komunikkanaloj kaj sia spirito de gefrateco, povas atingi per kunordigita kaj celkonscia laboro. Tiel ni povas en netruda maniero atentigi pri Esperanto homojn principe favorajn al similaj valoroj“.

Laŭ mia persona impresado inter esperantistoj la procentaĵo de ekologie konsciaj personoj efektive estas pli alta, ol en la ĝenerala loĝantaro. Malpli facile senteblo estas, ĉu ekologie konsciaj kaj kunlaboremaj homoj pli ol aliaj pretas interesiĝi pri nia lingvo. Nur anekdotoj: antaŭ kelkaj tagoj mi kunprenis la ĵurnalon de konata ĉeno de bio-vendejoj en Germanio. La ĵurnalo nomiĝas „Kreo“ kaj sur la kovrilpaĝo havas citaĵon en Esperanto. Verŝajne ekzistas komunecoj inter homoj, kiuj interesiĝas pri internacia kunlaboro por kontraŭi misevoluojn kaj la esperantistoj kiel bonvolemaj spertuloj pri interkompreniĝo. Se estas tiel, publike trakti daŭripovan evoluon povas proksimigi nin al interesa celgrupo. Ekzemple lokaj aktivuloj de aliaj asocioj kaj iniciatoj (ne la funkciuloj aktivaj ĉe la pinto de tiuj grupoj) foje plendas pri la problemoj stariĝantaj internaciajn kontaktojn kaj trovi partnerojn en eksterlando. Ni – ankaŭ niaj lokaj grupoj – havas tiajn kontaktojn kaj partnerojn.



Sed kiel argumenti, kaj kio krome ligas nin al la temo „daŭripovo“? Unu argumento estas, ke la realigo de la Celoj ankaŭ havas socian dimension. Ĝi postulas solidaran mondan komunumon, ĉar konscio pri la urĝeco devas formiĝi en ĉiuj landoj. Solidara komunumo bezonas komunikadon sen diskriminacio, egalrajtan kaj malfermitan por kultura diverseco. Ĉu uzi la argumenton de „humanece internaciismo“ (Lapenna), aŭ simple pledi por ŝparo de resursoj – tempo kaj mono – kompare al aliaj lingvoj, ambaŭ principe pravas. Ŝparo de resursoj ja ankaŭ proksimigas nin al la ideo de daŭripova evoluigo. Sed tempo kaj mono bezonataj por lingvolernado ne estas facile kompareblaj kun akvo, aero kaj fosiliaj energiportantoj. Respondeculo de registaroj kaj neregistaraj organizoj, hodiaŭ aktivaj en tiu kampo, jam investis en lingvolernadon kaj inter si bele-malbele komunikas en la angla. Ili povus argumenti, ke lerni Esperanton postulus aldonajn investojn, do foruzus iliajn intelektajn resursojn, pli utile uzatajn por plenumado de la 17 Celoj.

Sed ne temas unuarange pri la nuna generacio de gvidantoj, temas pri nia komuna estonteco. Solidareco kaj egalrajta

aliro al informoj tial devas resti kerno de nia argumentado, simile kiel la respekto por kultura diverseco (kiun unulingva aŭ eĉ 6-lingva reĝimo ne garantias), respekto ankaŭ por indiĝenaj kulturoj kaj scioj. Mi citas el papero de Bert de Wit, kunorganizanto de nia kongreso: „Kultura diverseco pliigas la ŝancojn, ke oni trovas solvojn por la problemoj rilate al malriĉeco, mediomalpurigado kaj sociala divido. Ja, diversaj kulturoj ofertas diversajn manierojn por konsideri problemojn, kaj tio pliigas la ŝancon, ke estontaj generacioj ankoraŭ povos ĝui bonfarton, puran akvon kaj aeron kaj agrablan socion. Tutmondiĝo, kiu forigas la kulturajn diferencojn, minacas malpliigi la postvivajn ŝancojn de la homaro“.

Laŭ la (internacie plej agnoskita) difino de la Brundtland-Komisiono de 1987 „Daŭripova evoluigo estas evoluigo, kiu kontentigas la bezonojn de la nuntempo, sen riski, ke estontaj generacioj ne povu kontentigi siajn proprajn bezonojn“. Ni ne vivu je kosto de niaj genepoj. Solidareco estas la ŝlosilvorto por atingi tiun celon. Ni do faru ĉion por postlasi al niaj genepoj mondon pli solidaran kaj egalrajtan.

Ulrich Brandenburg

## Germana Esperanto-Kongreso agnoskita kiel kleriga programo de Erasmus+

<https://www.esperanto.de/gek2022>



### Erasmus+ estas programo de Eŭropa Komisiono por edukado, junularo kaj sporto.

Ni taksis niajn ŝancojn sufiĉe malgrandaj, kiam kune kun nia partnera asocio Esperanto Nederland ni submetis formalan peton al Erasmus+ subvencii la ĉi-jaran kongreson en Oldenburg. Sed surprize ni sukcesis, la kongreso estas nun agnoskita kiel oficiala kleriga programo de Erasmus+ kun la temo „Daŭripovo“. Krom aprezo de nia laboro flanke de grava eŭropa instanco, tio signifas ankaŭ valoran financon subtenon.

En la kadro de la kleriga programo tuta aro da prelegoj prilumas la temon „Daŭripovo“ en diversaj kuntekstoj:

lingvo/komunikado, medio, ekonomio, trafiko, insuloj, la vivo de handikapitoj, virtuala mono kaj eĉ kosma rubaĵo. La liston de prelegontoj kaj planataj prelegoj vi jam povas rigardi en la kongresaj retpaĝoj. La prelegontoj venas ĉefe el Germanio kaj Nederlando, sed ankaŭ el Belgio, Israelo kaj Usono.

Krom la kleriga programo kompreneble okazos ankaŭ la kutimaj asociaj kaj administraj programeroj: la membrokunveno de Germana Esperanto-Asocio kaj kunsidoj de la landa ligo EMAS kaj fakaj asocioj, inter ili ankaŭ EBLOGO, la germana asocio de blindaj esperantistoj, kies prezidanto ankaŭ prelegos en la kleriga programo. Ni aparte ĝojas, ke ĉi-jare do partoprenos ankaŭ pluraj blinduloj.

Por doni al la partoprenantoj la okazon iom konatiĝi kun Oldenburg, estos gvidataj promenoj tra la urbo. Kaj la lastan tagon okazos vizito al la proksima urbo Bremen kun esperantlingva gvidado. Kompreneble ankaŭ vespera kultura programo ne mankos.

Planata estas ankaŭ lingvokurso por komencantoj, kiun ni diskonigos publike, tiel ke ankaŭ interesitoj el la ĉirkaŭaĵo povas partopreni.

Samloke kaj samtempe kun la kongreso Germana Esperanto-Junularo okazigas sian kursaranĝon KEKSO, en kiu junuloj lernas la lingvon je diversaj niveloj. Ĝiaj partoprenantoj loĝos aparte, sed havas okazon partopreni ankaŭ programerojn de la kongreso kaj tiel tuj praktiki siajn novajn lingvokonajn.



La preparlaboroj por la kongreso bone progresas, kaj ankaŭ la stato de aliĝoj estas tre kontentiga, malgraŭ la aktuala pandemia situacio. La kontingento de loĝĉambroj, kiujn ni rezervigis en la junulargastejo, estas preskaŭ elĉerpita, sed en piedira distanco al la kongresejo troviĝas pluraj hoteloj.

Indas de tempo al tempo rigardi la kongresajn retpaĝojn ([esperanto.de/gek2022](https://www.esperanto.de/gek2022)), por povi sekvi la evoluon de la programplanado. La retpaĝoj ankaŭ detale informas pri vojaĝeblecoj al Oldenburg kaj loĝeblecoj proksime de la kongresejo.


Franz Kruse

## Nova kunlaborantino en la GEA-oficejo: Elke Mondorf

Post la pensiigo de Sibylle Bauer – kiu laboris dum 5 jaroj por Germana Esperanto-Asocio kaj nun translokiĝis al suda Germanio – necesis trovi novan mastr(in)on de la oficejo en Berlino.

Tiu postenon nun okupas Elke Mondorf. Ŝi komencis meze de januaro kaj estas atingebla en la oficejo en Katzbachstraße 25 ĉiun mardon kaj ĉiun vendredon matene. La ĝisnunan retadreson [gea.oficejo@esperanto.de](mailto:gea.oficejo@esperanto.de) ŝi transprenis. Bonvolu uzi tiun adreson por via korespondado kun ŝi.

Elke Mondorf estas nun 62-jara. Ŝi origine devenas el Kolonjo, sed jam ekde la studado loĝas en Berlino. Ĉe FU Berlin ŝi atingis la gradon de M.A. phil. pri filozofio kaj politologio. Apud la nova okupo ŝi daŭre instruas la germanan kaj anglan ĉe privata instituto. Elke ĵus komencis lerni Esperanton kaj ekkutimiĝas al la taskoj de oficeja administrado en nia specifa medio. Ni deziras al ŝi bonan eklaboron!





## La mondo de libroj kaj periodaĵoj – Esperanto kaj aliaj planlingvoj

# Novaĵoj, sciindaĵoj kaj pripensproponoj el Germana Esperanto-Biblioteko Aalen

### Parto 64 – Raporto pri kelkaj temoj tre diversaj



**A**lvenis informo kaj alvoko, kiun sendis al ni el Bulgarujo la movade tre konata verkisto kaj Esperantisto Julian Modest, kies vera nomo ja estas Георги Михалков (Georgi Mihalkov).

Kial mi substrekas kaj mencias la veran nomon, kvankam Julian ja estas konata en nia movado sub lia plumnomo? Tion mi poste klarigos. Unue la alvoko mem:

#### Internacia literatura Esperanta konkurso „Ĥristo Gorov – Ĥrima“ – 2022

Ĥristo Gorov (plumnomo: Ĥrima) estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Por 2022 la Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson, en kiu partoprenu geesperantistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso estos por *rakonto kaj eseo*.

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkitaj en Esperanto. La konkurso ne havas konkretan temon. La verkoj estu tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu Esperantan alfabeton kun supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson (inan aŭ viran). La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plena poŝtadreso, telefono kaj interretadreso. La rakontoj kaj eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato A4, la literoj estu Times New Roman - 12 punktaj.

La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 31-a de oktobro 2022 al adreso: e-mail: [modest@abv.bg](mailto:modest@abv.bg) aŭ per la poŝto al adreso: Georgi Mihalkov, Sofio – 1229, “Vrabnica” 1, bl. 529 vh. A. et. 9 ap. 33, Bulgario.

Mi tre varme rekomendas, ke partoprenu ĉiuj niaj Germanaj “verkistoj” – mi konscias, ke ofte la samideanoj ja ion verkas aŭ verkis, eĉ se nur por la propra tirkesto kaj por ekzerci sin mem en la lingvo-uzado.

Tial nun ankaŭ mi mem alvokas ĉiujn: ne hezitu nove verki aŭ el-tirkestigi ion kaj sendi ĝin al tiu konkurso!

Mi konfesas, ke ĝis nun mi ne jam konis la historion kaj fonon de tiuj konkursoj.

Do: kiu estis tiu Ĥrima, kaj ĉu li havis gravajn kaŭzojn por uzado de plumnomo aŭ pseŭdonimo por kaŝi sian veran identecon?

Post ioma reserĉado mi pensas, ke eble ja ekzistis iuj kaŭzoj, kaj ke indas iomete priskribi tiun fonon. – Kial?

Laŭ mia pritakso necesas koni la historion fonon de la E-agadoj en la tiama Bulgarujo. Mi pensas, ke tion nur malmultaj de niaj nuntempuloj scias.

Temas pri la finantaj 20-aj jaroj de la antaŭa jarcento.

La E-organizoj devis defendi sin kontraŭ riproĉoj, ke iliaj membroj politike agadas (precipe temis pri komunismaj tendencoj). Sed ĉio ĉi ne helpis. En 1928 la bulgara edukministerio simple malpermesis E-kursojn en lernejoj kaj la abonadon de la gazeto Bulgara Esperantisto.

Multaj lernejoj kaj homoj ne obeis al tiu malpermeso. Tamen ekzistis eĉ provoj inter la membraro, postuli la aliĝon al faŝistaj organizoj (aŭ almenaŭ simpatii al tiuj).



Sed en la 30-aj jaroj la politiko ŝanĝiĝis kaj same la sinteno fronte al Esperanto.

Tamen ekzistas indicoj, ke la ŝtataj oficistoj malfidis al la Esperantistoj konjektante, ke ili uzas sekretan lingvon (dum la 24. Bulgara E-Kongreso 1937 aperis iu policano kaj postulis tute rezigni pri uzado de Esperanto kaj nur paroli en la Bulgara lingvo).

Denove en 1937 kaj same en 1938 estis malpermesita la E-instruado en lernejoj.

Kelkfoje oni raportis, ke ankaŭ Ĥristo Gorov estis arestita kaj devis iris al malliberejo. Mi ne plu miras, kial li ek de 1929 publikigis nur sub la pseŭdonimo H. M. Ĥrima.

Mallonge pri la persono kaj lia vivo (tute sen emoj prijuĝi aŭ la homon aŭ la agadon – kies vivo ja konsistas el nur pozitivaj eroj?):



**Христо ГОРОВ** (Ĥristo Gorov) naskiĝis en 1908 kaj mortis en 1999.


Li aktivis en SAT kaj en la Internacia Asocio de Revoluciaj Esperantaj Verkistoj (IAREV). Ekde 1928 li verkis poemarojn kaj rakontojn; ekzemple en 1930 aperis sub lia pseŭdonimo Ĥrima la „*Poemo de l'Plugisto*“.

Gorov fondis kaj redaktis la sekretan stencil-gazeton laboristan „*Sturmulo*“, kaj li estis en 1935 malliberigita por pli ol du jaroj pro laborista Esperanto-agado. En la dua mondmilito li agadis kiel kontraŭfaŝisma partizano. Poste, en la sekva reĝimo komunista li laboris en la partia aparato, ĉe ties Centra Komitato kaj ĉe la Ministra Konsilantaro.

Lia verkaro respegulas la pozitivajn homajn trajtojn: la solidarecon, la batalon por la bono, la strebon por honesta vivo. Dum multaj jaroj li estis prezidanto kaj estrarano de la Bulgara Esperanto-Asocio kaj en la Mondpaca Esperantista Movado ktp.

La konkurso ne estas tute nova, sed havas jam pli longan historion. Ekzemple en 2011 estis anoncita<sup>1</sup>, ke laŭplane ĝi okazos ĉiun trian jaron. En 2020 Maja Gorova, la filino de Ĥristo, okazigis jam la 7an fojon tiun ĉi tradician konkurson, kiu elokvente montras, ke la originala Esperanto-literaturo estas tre grava por la Internacia Lingvo kaj la esperantistoj tutmonde ne nur ŝatas la literaturon, sed ke multaj el ili ja kreas valorajn verkojn.

Esperable ni iam legos ankaŭ pri premio, atribuita al germana kontribuinto!



Sekvas temo 2-a, sed iom tute malsimila: **Recenzoj**

Eble ankaŭ vi iam ajn demandis vin, kiel oni povas fari taŭgan recenzon; laŭ mia sento, recenzo donu al la leganto, kiu ne jam konas la koncernan libron, informojn, pri kio temas, kiun impreson havis la recenzinto, ĉu ekestis kritiko pri stilo kaj kvalito de la lingvaĵo kaj eble ne laste, ankaŭ ĉu li rekomendas, aŭ aĉeti kaj/aŭ legi ĝin.

Kial mi skribis tiun ĉi antaŭrimarkon? Nu, laŭpete (kiel direktoro de nia, ankaŭ la via, Germana Esperanto- Biblioteko Aalen mi kiel eble plej ofte almozpetas, se aperas io nova, por eviti troajn elspozojn por akirado) mi ricevis la novan libreton de Fritz Wollenberg el Berlino – koran dankon al vi, Fritz!

Gvidiloj tra Berlin ja estas multaj, ĉu por infanoj, junuloj, familioj, turistoj, nove transloĝintoj, „kion oni nepre vidu antaŭ la morto“, piedirantoj, biciklistoj, aventuremuloj, manĝemuloj, ŝparemuloj, scivolemuloj pri sekretoj... – feliĉe nun ankaŭ haveblas specifa gvidilo pri la Esperanto-kulturo en tiu ĉi urbo!

Ĉu tio jam sufiĉas kiel recenzeto? Fakte jes! Kiu interesas pri la Esperanto-kulturo, tiu certe tuj aĉetos tiun libreton eksciinte pri ties apero, kaj kiu aldone intencas iam vojaĝi al la urbo Berlino, tiu des pli estu kaj estas instigita al akirado de ĝi.

Sed mi restu pli serioze! Ĉu mi decas arogi al mi skribi ion pri gvidilo tia, estinte tute malofte en tiu urbo? Laŭ la vidpunkto turisma: eble ne vere. Mi do iom skribu laŭ la vidpunkto de libro-amanta aŭ bibliofila homo (esperable oni ne taksas

min esti malsanulo, kiun kaptis la manio „cundoki“ – informoj ĉe [eo.wikipedia.org/wiki/Cundoki](http://eo.wikipedia.org/wiki/Cundoki)).

Datoj pri tiu ĉi libreto:

Temas pri gvidilo dulingva, en la Germana kaj en Esperanto, tra la Esperanto-kulturo en Berlino, kaj ĝi aperis jarfine de 2021 sub la titolo jena:

Wollenberg, Fritz (\*1948): Vom Zamenhofpark zum Rummelburger See = De Zamenhofparko al Rummelburger See; Stadtführer = Urbogvidilo. – Berlin: Eldonejo [privata] Fritz Wollenberg, 2021. – 52 S.; 21 cm. – ISBN 978-3-982 3965-0-7. – (Reise durch Berlin und seine Esperanto-Kultur = Vojaĝo tra Berlino kaj ĝia Esperanto-kulturo; 1)



Per la serio-titolo ĝi jam promesas, ke iam sekvos aliaj volumetoj – tion ni jam nun aspiras!

Mi persone trovis la lingvaĵon en ambaŭ lingvoj neriproĉebla, ke facile eblas ĉiam tuj kapti la enhavon, sen vortaro ĉemana; pri tio mi fakte ne miris, ĉar la aŭtoro ja jam longe estas sperta s-ano, uzanta nian karan lingvon.

En detaloj ne eblis al mi prijuĝi la informojn pri la faktoj donitaj, ĉar mi nur malofte kaj ĉiufoje mallonge estis en Berlino kaj precipe en tiuj ĉi distriktoj.

Sed ĉiukaze bela estas la ideoj, ke apud-efike la libreto ankaŭ instigu ĝiajn uzantojn post la unuaj informoj pri la lingvo kaj kulturo Esperanto provu pliprofundigi en tiu afero!

„*Se vi ne jam eklernis Esperanton, tiu ĉi eta gvidilo ofertas al vi unuan rigardon al la fascina kulturo, kiu estas ankaŭ interplektita kun tiu de Berlino. Uzu do la librofinan malgrandan lingvo-instruilon por ekkoni apud la lingvo ankaŭ lokojn, okazaĵojn kaj homojn de la Esperanto-kulturo en Berlino!*“ [Libere tradukita de mi.]

Krom tio ankaŭ tre plaĉas al mi la donitaj indeksoj de literaturo, retpaĝoj kaj personoj.

Pensante, ke nun jarkomence eble estas spaco por plua kontribuo de mi, jen iom nekutima alia recenzeto pri libro aperonta dum tiu ĉi jaro 2022, kies enhavon mi jam konas, ĉar mi subtenis ĝian aperadon per kontrollegaj rekomendoj; tial mi konas kaj la enhavon kaj ties aspekton.

Ankaŭ en nia najbara lando Pollando aperos jam tre baldaŭ gvidilo dulingva pri granda urbo interesa, iniciate de Małgosia Komarnicka en Wrocław.

Jen ĝiaj datoj:

Małgorzata Małgosia J. Komarnicka [k.a.]: Promene tra Wrocław. – [eldono dulingva en lingvoj pola kaj Esperanto] – Wrocław: Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, 2021. – 171 S. – 21 cm. – ISBN 978-83-954307-2-5.

1) <https://esperantomovado.blogspot.com/2011/02>



Unue kelkaj vortoj pri la celoj de tiu ĉi gvidilo:

En Vroclavo oni (la kunlabora skipo) konscias, ke necesas oferti agadojn specife por la pli aĝa generacio; kiel konate, ja preskaŭ tutmonde la socio konsistas el tre multaj maljunaj homoj. Tial indas investi siajn fortojn kaj tempon al tiu defio: „Ni decidis prepari la gvidlibron ĉefe por pliaĝuloj fare de pliaĝuloj ... la hodiaŭa generacio de pliaĝuloj 60+ estas ĉefe generacio de personoj, kiuj estas scivolaj pri la mondo. Ili do estas aktivaj kaj ili celas realigi neplenumitajn revojn al sia junaĝo. En la listo de tiuj revoj estas ĉefe vizitado...”

Precipa celo kompreneble estas priskribi la belecon kaj amindecon (kaj ofte unikecon) de la propra urbo kaj tiel instigi homojn al vizito.



Ĉu oni sukcesis realigi la tuj komence skribitajn intencojn, nome „Ni klopodis skribi tiun gvidlibron per facila kaj klara stilo“, tion ni prijuĝu post finlegado.

Kiel kaj kiuj faris la tutan laboron? Kompreneble ne nur unu sola persono, sed tuta skipo de pliaĝuloj, kiu ŝajne tre bone kaj harmonie kunlaboris, instigante unu la aliajn: de pliaĝuloj kaj por tia ĉi celgrupo (ne nur, sed ankaŭ).

Post enkonduko kaj mallonga ĉapitro pri la historio de la urbo Vroclavo, la leganto trovas 6 diversajn itinerojn tra tiu urbo, kaj fine aparta ĉapitro estas dediĉita al la fenomeno de la lingvo Esperanto; ne mankas finaj informoj pri la kunlaborantoj, listoj bibliografia kaj adresa.

La tuta libro estas farita dulingve, en la Pola kaj en Esperanto; la tekston bele akompanas ilustrantaj fotoj el la urbo.

Genia ŝajnas al mi la ideo, ke la proponitaj irvojoj de la diversaj itineroj estis ankaŭ praktike testitaj, ĉar anoj de la sama generacio 60+ piedire sekvis ilin kaj tiel ebligis indiki la necesitajn daŭrojn (kompreneble sen la individua tempo, kiun ĉiu unuopulo devus investi por detale observi la interesajn erojn survoje).

La gvidlibro ne celas esti kompendio pri Vroclavo, ankaŭ ne provo de konkurenco kun iu ajn profesia gvidilo tra la urbo. La ambicio de la preparantoj ankaŭ ne estis multoblige jam ekzistantajn perfektajn, precipe historiajn prilaborojn pri Vroclavo.

Ĝi invitas al neforgeseblaj travivaĵoj kaj plezuroj, ĉar Vroclavo estas escepta urbo kun multaj interesaj lokoj. Laŭdire: *kiu ĝin foje vizitis, amos ĝin por ĉiam.*

Persone mi nur unufoje kaj tro mallonge estis tie, sed laŭ la intensa legado de la libreto, mi tamen emas konfirmi tiun ĉi laŭdiron – do certe sukceso de la iniciatintoj.

Estas donitaj rekomendoj al lokoj por ripozi kaj manĝi, kaj ne mankas indikoj pri tempo por vizitado kaj informoj pri la

rekomenditaj objektoj. Ĉu estas tasko de recenzo anticipa, jam detale priskribi la enhavon de la baldaŭ aperonta libro, ekz. kien precize gvidas vin la priskribitaj itineroj? Tute ne! Sed ja necesas vekti la scivolemon de interesuloj, por ke ili akiru ĝin, por ĝuado kaj profitado dum vizitoj venontaj. Mi ne jam havis ĝin en la manoj, ĉar la presado ankoraŭ daŭras, sed okupinta dum multaj horoj per legado intensa de ĝia virtuala kopio mi ne povas ne rekomendi ties aĉeton, kiun vi ne bedaŭros.



Tamen ne manku la promesita fina pritakso de la lingvaĵo. Ofte mi renkontis fakesprimojn, kiujn mi ne jam parkere konis (kvankam supozante, ke mi kaptis la celitan sencin). Mi koncedas, ke kelkfoje mi cerbumis, kiun alternativon mi proponu. Mi rezignis pri tio, ĉar ofte ne estis facile trovi iun pli trafan esprimon.

Mi do demandis min mem, ĉu vere necesas apliki la postulitan facilan kaj klaran stilon, evitante malfacilajn, ĉar fakajn esprimojn, kiujn ja ĉiu sperta s-ano facile povus trovi en la reto (uzante la retejon <https://vortaro.net/>). Mia fina konkludo: klaran stilon oni certe ĉiam alstrebu, sed ne nepre facilan (kaj tial kelkfoje malprecizan kaj malklaran).

Cetere: se iu nepre nur volas legi kaj uzi facilajn tekstojn, al tiu mi varme rekomendas



**CHRISTLICHES GLOSSAR**

ein zweisprachiges christliches Fachwörterbuch  
Deutsch – Esperanto

Urheber / verkinto:  
Bernhard Eichkorn

**KRISTANA GLOSARO**

dulingva kristana fak-vortaro  
Germana – Esperanta

Zielsetzung vom 21.12.2001 – abhaken per anklicken bis zum 21.12.2001

tiujn, kiuj aperas regule en <https://uea.facila.org>, retejo, kiun prizorgas tuta skipo de kunlaborantoj, i.a. kaj ofte Anna Löwenstein.

Volonte mi nun kaptas ankaŭ la eblecon, rekomendi por la legantoj la fakajn vortaron „Kristana glosaro – Christliches Glossar“<sup>2</sup> de amiko Bernhard Eichkorn, kiu spite al sia jam alta aĝo (baldaŭ 88) klopodas elsarki kaj plibonigi ĝin daŭre; intertempe ĝi atingis jam 1474 paĝojn!

Utho Maier

2) <http://bernhardeichkorn.de/kristana-fak-vortaro/> aŭ <http://bernhardeichkorn.de/Glossar/index.html>

## Laste, malfrue kaj mallonge, sed tamen des pli ne malgrave:

Preskaŭ jam estis la redaktifino, kiam atingis min la sekva informo el la Aŭstra Nacia Biblioteko.

Kaze ke niaj Aŭstraj kontribuantoj ne privarbas tion, almenaŭ mi volas atentigi al la tre valora iniciato/oferto de la Aŭstra Nacia Biblioteko. La retejo: <https://onb.digital/> ebligas nun serĉi ne nur laŭ la katalogitaj informoj, sed ankaŭ en la bitigita teksta enhavo de la eroj. Por profiti el tio, bedaŭrinde necesas regi la Germanan aŭ la Anglan lingvojn; ne (ĉu ne jam?) ekzistas reteja fasado en Esperanto.

Ekzemple oni nun povas foliumi tra la kolekto de 240 fotoj kaj poŝtkartoj el la 10 unuaj universalaj kongresoj<sup>3</sup>, aŭ rigardi



## Alma – la mondo antaŭ la hejma sojlo

Alma estas diferenca. Vidante la filinon, novnaskitan kun diversaj korpaj ŝarĝoj, la gepatroj de Alma imagas por ŝi mallongan kaj malfacilan vivon.

Sed Alma havas vekecan spiriton kaj obstinon trovi kaj evoluigi siajn talentojn. Ŝi avidas je informoj, konsumas gazetojn kaj lernas lingvojn, kiel aliaj legas librojn. Ŝiaj scivolemo kaj kapablo observi kondukas ŝin jam frue for de la gepatra domo en la mondon, kie ŝi laboras komence kiel instruistino kaj tradukistino.

Tiam ŝi realigas siajn revojn kaj dum ok jaroj kiel aŭtorino vojaĝas sola tra kvin kontinentoj, verkante raportojn pri siaj aventuroj kaj pri la popoloj renkontitaj.


Alma Karlin, la virino, pri kiu rakontas la infanlibro, naskiĝis fine de la 19-a jarcento en la slovena Celje – siatempo parto de la aŭstro-hungara regno. La tempo ne favoris memstare decidantajn kaj agantajn virinojn – des malpli handicapitajn.

La libro per sobraj vortoj karakterizas la admirindan knabinon kaj kun brilaj ilustraĵoj vicigas epizodojn de ŝia vojo de kompatita estaĵo al klera aŭtorino.

La tekston, verkitan de Mojejeja Bonte, esperantigis Marija Nikolaja Rožej. La ilustraĵojn desegnis Polona Kosec. La grandformatan, kartone binditan libron, kuneldonis la

147 bildojn de kaj pri la Germanaj Esperanto-kongresoj (sufiĉas por tio entajpi „gerek“ kiel serĉesprimon).

Same interesa certe estas ankaŭ la priskribo<sup>4</sup> (nur en la Germana), kiel eblas trovi informojn en la arkivita reto. Verŝajne ne nur mi jam foje serĉis retejojn, kiuj ne plu haveblas en la tut-tera-tekstoj.



Esperanto-Societo Ljubljana. Ĝi estas mendebla ĉe la Slovena Esperanto-Ligo (retadreso [info\(ce\)esperanto.si](mailto:info(ce)esperanto.si)) aŭ en via librovendejo (ISBN 978-961-6557-10-8).

Guido Brandenburg



3) <https://onb.digital/search/167408>

4) <https://www.onb.ac.at/forschung/forschungsblog/artikel/wiesie-website-im-archivierten-web-suchen-findet-und-sichanzeigen-lassen-koennen>





*Es gibt Momente im Leben, da steht die Welt für einen Augenblick still  
und wenn sie sich weiter dreht, ist nichts mehr wie es war.*


## Wolfgang Leo Bohr

★ 19.07.1954 † 08.11.2021

*Danke*

für all die Unterstützung,  
herzliche Anteilnahme  
und vielen tröstenden Worte.

Ilona, Marit, Torben und Lara  
mit Familien



Nachdem nun etwas Ruhe eingekehrt ist  
möchten wir uns für die unbeschreiblich  
große Hilfe, vielen Spenden und  
unzähligen aufbauenden Worte nach der  
Flut im Juli vielmals von Herzen  
bedanken!

Dankeschön auch im Sinne von  
Wolfgang,

Ilona Bohr und Familie